



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
97-a jaro • n-ro 1171 (6) • **Junio 2004**

Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno 75-jara



**Pluraj kialoj
iri al Ĉinio**

**Esperanto en
amaskomunikiloj**

**Estrara Raporto
2003**

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎, ✉ +421 43 4222 788
✉ revuo@uea.org; revuo@stonline.sk

Aperas:

en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 34); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO. Unuopa ekzemplero kostas EUR 3,00.

Anoncarifoj (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90. Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe Postbank, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam (IBAN: NL24PSTB0000378964 SWIFT: PSTB NL21)

42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank, Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam (IBAN: NL66ABNA0426051599 SWIFT: ABNA NL2R).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

☎ +31-10-436-1044, ✉ +31-10-436-1751, ✉ uea@inter.nl.net

TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.



Enhavo

- 123 Malferme: Pluraj kialoj por iri al Ĉinio (Osmo Buller, Clay Magalhães, Marko Naoki Lins).
- 124 Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno 75-jariĝas (intervjuo kun Herbert Mayer).
- 125 Esperanto en amaskomunikiloj (Marko Naoki Lins).
- 126 La membraro de UEA en 2003.
- 127 **Estrara Raporto 2003:** Memoro kaj prognozo (redaktis Humphrey Tonkin). Enkonduko (Renato Corsetti).
- 128 1. La laboro. Kio estas la Estrara Raporto?
- 129 1.2 Informado (Andrej Grigorjevskij). 1.3 Instruado (Radojica Petrović).
- 130 1.4 Faka agado (Ivo Osibov).
- 131 1.5 Kulturo (Humphrey Tonkin).
- 132 1.6 Kongresoj (Ivo Osibov). 1.7 Eksteraj rilatoj (Lee Chong-Yeong).
- 133 1.8 Landa kaj regiona agado (Michela Lipari). Afriko.
- 134 Ameriko. Arabaj landoj. Azio. Eŭropo.
- 135 Oceanio. 1.9 Esploro kaj dokumentado (Humphrey Tonkin).
- 136 2. La organiza bazo. 2.1 La decida organo: la Komitato. 2.2 Rilatoj kun TEJO.
- 137 2.3 Revuo. 2.4 Administrado.
- 138 Spezokonto. Bilanco.
- 140 Konkludo.
- 141 Laste aperis.
- 142 Forpasoj. Kiel funkcias UEA? La Estraro de UEA. Instituto Hodler '68.

KOVRILPAĜE: En oktobro la Aŭstria Nacia Biblioteko festos per simpozio la 75-jariĝon de la Esperantomuzeo en Vieno, kiu en 1929 fariĝis sekcio de tiu renoma biblioteko. Sur la bildo: Aŭstria Nacia Biblioteko, hejmo de la Esperantomuzeo en Vieno. Legu pli sur la p. 124. Foto: Herbert Mayer.

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (strategio kaj planado): d-ro Renato Corsetti, Via del Castello 1, IT-00036 Palestrina, Italio; ☎ +39-06-957-57-13; ✉ +39-06-957-66-33; ✉ renato@esperanto.org.

Vicprezidanto (kulturo, esploro kaj dokumentado): prof. Humphrey Tonkin, 279 Ridgewood Road, West Hartford CT 06107, Usono; ☎ +1-860-561-26-69 [h]; ✉ +1-860-561-52-19 [h]; ☎ +1-860-768-44-48 [of]; ✉ +1-860-768-44-11 [of]; ✉ tonkin@mail.harford.edu.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Resp.; ☎ +82-53-765-0880 [h]; +82-53-652-4488 [of]; ✉ +82-53-652-8141 [of]; +82-53-765-0881 [h]; ✉ lee@esperanto.net.

Ĝenerala Sekretario (faka agado, rilatoj kun la Komitato, kongresoj, Nobel-kampanjo): s-ro Ivo Osibov, Vinkovačka 25, HR-21000 Split, Kroatio;

☎ +385-(0)21-535-650 [h]; +385-(0)21-355-550 [of]; ✉ +385-(0)21-393-597 [of]; ✉ osibov@pravst.hr.

Financo, administrado: s-ino Ans Bakker-ten Hagen, Kastelensir. 231-II, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando; ☎ / ✉ +31-(0)20-642-18-53; ✉ ans.bakker@esperanto.org.

Eduko, ILEI-rilatoj, sporto, afrika agado: s-ro Gbego Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎ +228-227-21-17; ✉ esp.togo@cafe.tg.

Informado, rilatoj kun TEJO: s-ro Andrej Grigorjevskij, ul. Lenina 40-14, RU-429120 Ŝumerlĵa, Ĉuvaŝa Respubliko, Rusio; ☎ +7/83536/59856; ✉ volg@uea.org.

Landa agado: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-06-39-72-61-98; ✉ +39-06-39-72-61-69; ✉ michela.lipari@esperanto.org.

Observanto de TEJO: Sonja Petrović. **Observanto de ILEI:** Radojica Petrović.

Pluraj kialoj por iri al Ĉinio

Restas nur kelkaj semajnoj ĝis la 89-a UK en Pekino. Pri tio, kiel stas la preparoj kaj kio atendas nin post la Granda Muro, intervjuis Marko Naoki Lins du kompetentajn homojn: la Ĝeneralan Direktoron de UEA Osmo Buller kaj la Konstantan Kongresan Sekretarion Clay Magalhães.

☞ **Duan fojon post 1986 la UK gastos en Ĉinio, denove en Pekino. Bonvolu rakonti koncize pri la loko, ejo kaj la ebloj.**

Magalhães: La kongresejo estas nova, kun ĉiuj modernaj ekipaĵoj kaj homamika disdivido de la spaco. Ĝi situas en strategia loko, ĉe unu el la plej gravaj vojoj de la urbo kaj ligita kun du altkomfortaj hoteloj.

☞ **Kiuj estas la plej grandaj diferencoj inter Ĉinio de 1986 kaj tiu ĉi jaro?**

Magalhães: Mi ne estis en Ĉinio antaŭ mia unua vojaĝo pasintjare, sed Pekino bele impresis min. Ĝi estas tre moderna urbo kiu harmonie vivas kun sia pasinteco.

Buller: Mi estis en Pekino en 1986. Kiam mi revenis en 2001 por esplori reokazigon de UK, nur la famaj historiaj vidindaĵoj atestis, ke tiu moderna urbejo tamen estas la sama, kie ni jam unufoje kongresis. Estis vere malfacile imagi tian ŝanĝejon en nur 15 jaroj.

☞ **Bonvolu rakonti iomete pri la specialaĵoj de la programo.**

Magalhães: La artaj aranĝoj estos ĉine kaj azie orientitaj kaj ankaŭ la kongresa temo *Lingva egaleco en internaciaj rilatoj* tuŝos apartaĵojn de la regiono, i.a. kadre de la Nitobe-simpozio. Eble la ĉefa specialaĵo tamen estos la ekskursoj. Ili estos abundaj kaj konatigos kun historio, naturo, kulturo kaj modernaj flankoj de Ĉinio. Plia kialo iri al Ĉinio estas konatiĝi kun ĝia kuirarto. La Pekina anaso estas delikataĵo, kiun ĉiu ne-vegetarano nepre gustumu. Tamen, ankaŭ vegetaranoj absolute ne malsatos!

☞ **Kun kiom da partoprenantoj vi kalkulas?**

Buller: La 13-an de majo estis 1488 aliĝintoj el 49 landoj. La nombro kreskos ankoraŭ eble je 200-300.

☞ **Kio igos la ĉi-jaran UK speciala? Ĉu ĝi estos speciale ĉina aŭ azia?**

Magalhães: Ĉiu UK estas speciala. Per Esperanto eblas ekkoni aliajn homojn kaj kulturojn sen lingvaj ĝenoj.

Informado, rilatoj kun TEJO: Tio evidentiĝas precipe dum UK-oj. Ĉinio estas lando kun kulturo pli malnova ol tiu de okcidento, sed, iagrade, malfacile enirebla. La kono de okcidentanoj pri Ĉinio estas supraĵa kaj ŝablona, sed dum la

UK eblos pli profundaj kontaktoj kun ĝiaj kulturo kaj la kutimoj de la popolo. Kaj ankaŭ Ĉinio havos la eblon ekkoni, renkonti eksterlandanojn. Imagu kiel bela estos la etoso, kiam tiom da diversaj personoj interkonatiĝas! La UK estos ĉina, kun kelkaj elementoj tutaziaj.

Buller: Ĝi estos ĉina jam pro tio, ke ĉ. duono de la kongresanoj estos Ĉinoj. Krom ke ili estos pli multnombraj ol en la unua Pekina UK, ankaŭ lingve ili estas pli maturaj ol en 1986, kiam la movado en Ĉinio estis apenaŭ naskiĝanta. Ke du trionoj de la kongresanoj estos azianoj, faros la Pekinan UK ankaŭ azia.

☞ **En Gotenburgo oni povis la unuan fojon virtuale ĉeesti la UK-on. Ĉu vi antaŭvidas ion similan aŭ ion absolute novan?**

Buller: La retejoj www.uea.org/kongresoj/uk_2004 kaj www.esperanto.com.cn/uk2004 jam nun havas multe da materialo. Dum la kongresa semajno oni sekvu la ĉi-lastan adreson por virtuale ĉeesti.


☞ **De tempo al tempo oni aŭdas pri novaj Sarso-kazoj en Pekino. Kiel reala vi taksas la danĝeron de tiu malsano por la kongresano?**

Magalhães: La Ĉinaj aŭtoritatoj certe, surbaze de pasintjaraj spertoj, efike zorgas por ke ne aperu nova epidemio. Nun, meze de majo, oni ankaŭ ne plu aŭdas pri novaj suspektaĵoj. Mi mem denove iros al Ĉinio fine de majo kaj estas tute trankvila. Estas tamen fakto, bedaŭrinde, ke la pasintjara epidemio malfavore influis la aliĝojn.

☞ **Kiajn ideojn vi havas por atentigi la publikon kaj la gazetaron pri la UK?**

Buller: Indas emfazi ĝuste tion, ke la UK okazos en Ĉinio, lando kun ĉiam pli ŝlosila rolo en la monda vivo kaj pozitive scivolema pri potencialoj de Esperanto en internacia rilato. Se temas pri la ĉina gazetaro, ĝian atenton sendube altiros la jama subteno de ŝtataj eminentuloj al la UK kaj ilia persona ĉeesto en kongresaj aranĝoj.

☞ **Kiun lokon havas la UK en la tuta Esperanto-movado? Kio estas ĝia signifo? Kiujn impulsojn vi atendas de la UK por la regiona E-movado?**



Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno 75-jariĝas

En oktobro la Aŭstria Nacia Biblioteko festos per simpozio la 75-jariĝon de la Esperanto-muzeo en Vieno, kiu en 1929 fariĝis sekcio de tiu renoma biblioteko. La organizon de la aranĝo subtenas Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Esperanto-Instituto en Hago. La evento estis por ni okazo paroli kun la gvidanto de la “Esperanto-muzeo kaj Kolekto por Planlingvoj”, Herbert Mayer, kiu informas pri la evoluo de tiu instituto dum la lastaj jaroj.

☉ En la lastaj tri jaroj okazis gravaj ŝanĝoj por la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Fakte temas pri speco de privatigo, oni diras.

Ne estas „privatigo“ en la vera senco de la vorto. La Esperanto-muzeo (ekde nun ĝia oficiala nomo) estas parto de la Aŭstria Nacia Biblioteko, unu el la plej renomaj bibliotekoj en Mez-Eŭropo. Kaj ĝin oni administras ekde 2002 laŭ privata juro. La havaĵo de la biblioteko restas ĉiam posedaĵo de la ŝtato, sed la bibliotekistoj laborantaj tie fariĝis dungitoj de speco de firmao kaj ne plu de la ŝtato. Komprenible la necesa mono venas daŭre de la ŝtato, ĉar ne ekzistas biblioteko, kiu povus produkti gajnon.

☉ Kiel vi taksas tiun evoluon?

Komprenible rezultis el tio konsekvencoj por la dungitoj. La entrepreno spertis nov-organizon kaj la muzeo devis trovi sian lokon en la novaj strukturoj. Nun ni povas fari la unuan bilancon: La ŝanĝoj por ni estas tre pozitivaj. Ni ne sukcesis gardi la antaŭan statuson, sed firmigi provizoraĵon: la tria labor-posteno, kiun ni ricevis nur povizore en 1995, fariĝis definitiva. Tri personoj deĵoras nun en nia instituto. La ŝtato do financas Esperanto-muzeon kun

Magalhães: UK estas la plej grava okazaĵo en la movado, ĉar ĝi kunigas la plej grandan nombron da esperantistoj en la jaro. Dum ĝi la gvidorganoj de UEA decidis pri la estonto de la organizita movado kaj preskaŭ ĉiuj asocioj, grupoj kaj rondoj kunsidas, sur neŭtrala tereno. Post la UK, krom eble ankaŭ financa profito, la regiona movado havas homajn profitojn. Multaj, kiuj iam aŭdis pri Esperanto kaj kredis ke ĝi fariĝis morta lingvo, vidas konvinke, ke ĝi vivas kaj bonfartas. Tio kuraĝigas ilin kaj ili aldonigas al nia movado. UK-oj estas bonega ŝanco montri al la aŭtoritatoj, ke ni estas seriozaj, kio estas kondiĉo, por ke ili estu pretaj helpi la lokan movadon.

Buller: La Pekina UK ricevos ekstran signifon pro tio, ke tie oni elektos novan Estraron de UEA. Ankaŭ tial esperantistoj ligas kun ĝi grandajn esperojn.

☉ Resume: kial oni partoprenu la UK-on 2004?

Buller: Ĉar nenio estas kiel UK kaj certe ne kiel UK 2004.



La ekspozicia salono de la Esperantomuzeo.

biblioteko, kiu estas la plej granda kolektaĵo por planlingvoj.

☉ Vi ĝuas do specon de privilegio. Krom UEA estas nur malmulte da Esperanto-organizoj kun pli da dungitoj. Por kio vi uzas tiun laborforton?

Nu, unu plentempa posteno konsumiĝas komplete por la rilato kun la publiko. Ekzemple en 2003 ni havis 2600 vizitantojn de la muzeo kaj estis proksimume 400 homoj, kiuj utiligis nian bibliotekon. Ni respondas rete kaj telefone diversajn demandojn pri Esperanto. La vizitantoj estas grandparte neesperantistoj, kiuj volas havi informon pri nia lingvo. Informante ni tiel varbas por Esperanto – kaj pro la fakto, ke la plejmulto venas el eksterlando, nia varbado efikas ankaŭ por foraj landoj. Kaj krom muzeo, nia instituto estas biblioteko. Kiel parto de la Nacia Biblioteko ni estas tute integritaj en la necesa moderniga evoluo. Nia celo estas komputile katalogi ĉiujn niajn havaĵojn: ĵus ni finis la retrospektivan laboron de la kataloga datumbanko TROVANTO, kiu dokumentas niajn librojn, broŝurojn, manuskriptojn, muzikaĵojn ktp. Ekde somero enestis ankaŭ niaj revuoj. Per tio ni atingos preskaŭ 40 000 rikordojn, t.e. 40 000 dokumentojn. Sed grandaj taskoj atendas la prilaboron, ekz. la komputila enkatalogigo de niaj 20 000 fotoj kaj de niaj 2000 muzeaj objektoj.

☉ Ĉu la publiko utiligas tiajn katalogojn?

Klara respondo: jes. TROVANTO estas atingebla en interreto kaj ricevas monate proksimume 1000 vizitojn. Tio jam estas sufiĉe bona ŝtato. Sed ĵu pli da homoj konstante konsultas TROVANTON, des pli nia graveco interne de la Nacia Biblioteko akcentiĝas.

☉ Kiel vi pritaksas la estecon de via instituto?

Se mi rigardas la evoluon de nia instituto, mi havas tute pozitivan opinion. Ĉiam mi ekdeĵoris en 1985, nia instituto estis rigardata interne de la biblioteko mem kiel strangajo. Tiu epoko estis terura situacio. Mi ankoraŭ bone memoras, ke estis konstantaj mokoj de miaj kolegoj-bibliotekistoj pri tiu stranga muzeo ie en subtegmentejo de la Kortega Kastelo. Hodiaŭ – du jardekojn poste – ni estas tute plenaryta instituto, kiun oni ne plu honte kaŝas, sed prezentas al la publiko. Kronos tiun evoluon la translokado al renovigita baroka palaco, antaŭvidita por la venonta jaro. Tie ni

havos malgrandan, sed tute modernan kaj informan muzeon pri Esperanto – kaj sufiĉe da loko por nia konstante kreskanta libraro.

☉ Kiel vi vidas la rilaton inter la Esperantomuzeo kaj la Esperanto-movado?

Mi vidas tiun rilaton kiel simbiozon. La vivo de forta Esperanto-parola komunumo estas parto de nia ekzistaro. Ni havas grandan intereson, ke ĝi floru kaj prosperu. Aliflanke la Esperantomuzeo en sia funkcio kiel unika planlingva biblioteko ofertas valorajn servojn al la kulture interesitaj esperantistoj. Sed ni estas nemovada instanco kaj devas kondukti kiel tia. Tio havas ankaŭ konsekvencojn en nia publikrilata laboro.

☉ Publikrilata laboro, varbado kaj informado estas esencaj taskoj

Esperanto en amaskomunikiloj

La ĉi-jara aprilo estis speciale sukcesa monato rilate raportadon pri Esperanto en amaskomunikiloj.

Germanio estis fekunda tereno por pri-Esperanta raportado: Krom pluraj artikoloj en tre renomaj kaj eldonkvantofortaj gazetoj, dufoje oni raportis en televidaj elsendaĵoj. La german-franca kulturkanalo Arte prezentis partoprenantojn de la marta TEJO-seminario en Bruselo kaj la edukkanalo 3sat diskutigis Esperanton kiel alternativon por la lingva demando en Eŭropo.

Specialan dankon meritas la Esperanto-novajportalo EsperantoLand (www.esperantoland.org) de Lu Wunsch-Rolshoven el Berlino, kiu tre profesivelele kampanjis gazetare por la germana paska Esperanto-aranĝo PSI. Rezulto: notico pri la aranĝo de la germana novaĝentejo

dpa, kiu sekvigis plurajn noticojn en germanaj gazetoj. Kontinue raportas pri Esperanto aŭ esperantistoj ankaŭ pluraj francaj gazetoj. Aprile *Ouest France* kaj la franca novaĝentejo *AFP* raportis pri Zef, bretona esperantisto kiu volas dum la venonta monato bicikli tra Eŭropo ĝis fora Siberio. Ankaŭ germana gazeto raportis pri tio. Sojle al la pilargigo de Eŭropa Unio la lingva temo estis vaste prezentita en eŭropaj gazetoj. Pluraj artikoloj menciis Esperanton, ĉu kiel seriozan, ĉu utopian alternativon. La raporto de Dell'Alba pri plurlingvismo en la Eŭropa Parlamento kaj ĝia sugesto pri Esperanto ankaŭ estis temo en *Sunday Herald*, *BBC News* kaj *Euractiv.com*.

de la Esperanto-parola komunumo. Kial via statuso de nemovada instanco havas konsekvencojn ĝuste sur tiu tereno?

Kiel mi diris, ni informas multajn diversnacajn vizitantojn pri Esperanto. Sed mi devas atentigi pri principo de ŝtata entrepreno: Nia tasko ne estas varbi por Esperanto, sed dokumenti kaj informi pri la faktoj. Tamen grandparte informo pri Esperanto estas samtempe varbado. Ni klopodas forigi tiujn trivitajn antaŭjuĝojn kontraŭ nia lingvo kaj celas prezenti ĝin en objektiva kaj samtempe tre pozitiva maniero.

Ni ne forgesu, ke ĝuste la fakto, ke ni estas parto de la Nacia Biblioteko, donas al ni regule la eblojn elpaŝi al la publiko. Ni partoprenas preskaŭ ĉiujare grandajn ekspoziciojn kaj per tio rikoltas eĥojn en la amas-komunikiloj neatingeblajn ekzemple per gazetara servo.

La Esperantomuzeo ofertas al la esperantistoj kaj ĉiu intereso kulturan instrumenton, nome plene funkcionantan modernan bibliotekon, kiun en tiu formo la Esperanto-movado ne povus financi, precipe ne dum tiom longa tempo.

☉ La Esperantomuzeo festos en 2004 jubileon kaj vi planas organizi simpozion en tiu ĉi jaro.

Jes, jam 75 jarojn ni estas parto de la Nacia Biblioteko. Tio estas unika fakto en la historio de Esperanto. Nur dum la tempo de la nazia reĝimo nia instituto estis fermata – kaj ĝuste tion ni memorigas per la simpozio okazonta la 8-an kaj 9-an de oktobro en la Nacia Biblioteko en Vieno. La titolo de la simpozio: *Esperanto en la Uragano de la Ideologioj*. Ĉefpreleganto estos Ulrich Lins, la korifeo pri tiu temo. Sed la temaro ne estos tute historia. La prelegantoj, inter ili la lingvisto profesoro Heiner Eichner, Detlev kaj Vera Blanke, Claude Piron kaj Vilmos Benczik, eminenta specialisto pri komunikada teorio, tuŝos la temon ne nur el pure historia vidpunkto, sed trovos koneksion al la hodiaŭo kaj la hodiaŭa situacio de nia lingva komunumo. Dum la simpozio ni honoros ankaŭ la filinon de la majstro Lidia Zamenhof, kiu farigis ĉi-jare centjara, kaj en soleno prezentigos la eldono de ŝia Plena Verkaro editorita de Bernhard Westerhoff. La simpozio apogas UEA kaj Internacia Esperanto-Instituto en Hago, pro kio ni kore dankas. Paralele okazas: “Internacia Esperanto kurso laŭ la rekta metodo”.

Kontaktoj: Esperanto-muzeo, Hofburg, Michaelerkuppel, AT-1010 Wien. Tel. +43/1/53 55 145, rete: plansprachen@onb.ac.at. Hejmpaĝo kaj aliro al TROVANTO: <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/eo/index.htm>.

La vjetnama novaĝentejo *AVI* raportas pri tutmonda kvizo organizita kvaran fojon por esperantistoj. Ankaŭ legantletoj aperis en renomaj gazetoj. Irlanda *Irish Times*, brita *Financial Times*, germana *Süddeutsche Zeitung* kaj itala *La Stampa* publikigis reagojn de esperantistoj.

La daŭra aŭdiado de Esperanto-rilataj artikoloj en la retlisto *Reago* (groups.yahoo.com/group/reago) ebligas la tujan reagon de esperantistoj el la tuta mondo al tiuj artikoloj. Videbla sukceso estas la publikigo de legantletoj. Vi estas bonvena aliĝi al *Reago*. La menciitaj artikoloj kaj pliaj estas troveblaj ĉe: www.lingvo.org/gazetaro (pasvorto: *saluton*).

Bedaŭrinde ni ne sukcesas – malgraŭ interreto – trovi ĉiujn Esperanto-menciojn. Precipe la ekstereŭropa kaj nordamerika gazetaro estas subreprezentata. Se vi legas pri Esperanto en la gazetaro, bonvolu sciigi al ni. Ni sciigos al la aliaj!

Marko Naoki Lins
Brusela Komunikadcentro



LA MEMBRARO DE UEA EN 2003

Lando	AM	IM	Sume	Lando	AM	IM	Sume
Albanio	-	13	13	Kongo (Dem. Resp.)	25	10	35
Algerio	-	2	2	Korea Resp.	278	40	318
Angolo	-	2	2	Kostariko	27	6	33
Argentino	25	28	53	Kroatio	218	62	280
Armenio	25	10	35	Kubo	100	23	123
Aŭstralio	100	54	154	Kuvajto	-	1	1
Aŭstrio	50	50	100	Latio	62	15	77
Azerbajĝano	-	5	5	Libano	-	3	3
Bangladeŝo	-	1	1	Litovio	83	44	127
Barĥino	-	1	1	Luksemburgio	97	13	110
Belgio	641	148	789	Madagaskaro	-	10	10
Belizo	-	1	1	Makedonio	25	9	34
Benino	25	11	36	Malajio	-	2	2
Bjlorusio	-	6	6	Malto	35	2	37
Bolivio	-	1	1	Meksiko	7	15	22
Bosnio-Hercegovino	60	16	76	Moldavio	-	2	2
Brazilo	246	404	650	Mongolio	-	4	4
Britio	403	166	569	Nederlando	277	259	536
Bulgario	140	53	193	Nepalo	-	10	10
Burkina Faso	-	1	1	Niĝerio	-	13	13
Burundio	-	17	17	Nikaragvo	-	1	1
Cipro	-	1	1	Norvegio	197	63	260
Ĉeĥio	152	77	229	Nov-Zelando	39	35	74
Ĉilio	25	6	31	Omano	-	1	1
Ĉinio	1050	124	1174	Pakistano	100	14	114
- Hoskongo	-	4	4	Panamo	-	1	1
- Tajvano	-	2	2	Peruo	25	6	31
Danio	133	90	223	Pollando	100	81	181
Dominika Resp.	-	2	2	Portugallio	77	12	89
Ebura Bordo	25	2	27	Ruando	-	1	1
Egiptio	-	2	2	Rumanio	79	35	114
Ekvadoro	-	1	1	Rusio	92	167	259
Estonio	25	27	52	Salvadoro	-	1	1
Finlando	210	200	410	Senegalio	-	9	9
Francio	564	601	1165	Serbio k Montenegro	64	36	100
Gatano	-	8	8	Slovakio	78	32	110
Germanio	682	549	1231	Slovenio	100	20	120
Greklando	93	16	109	Srilanko	-	4	4
Gvatemalo	-	2	2	Sud-Afriko	38	8	46
Haitio	-	1	1	Svedio	400	215	615
Hinda Unio	100	19	119	Svislando	82	110	192
Hispanio	325	142	467	Tagikio	-	3	3
Honduro	-	1	1	Tajlando	-	1	1
Hungario	137	85	222	Tanzanio	-	23	23
Indonezio	-	2	2	Togolando	250	38	288
Irano	120	30	150	Tunizio	-	3	3
Irlando	50	16	66	Turkio	-	2	2
Irlando	56	24	80	Uglando	-	6	6
Israelo	89	74	163	Ukrainio	154	32	186
Italio	821	204	1025	Urugvajo	25	12	37
Japanio	1069	376	1445	Usono	350	371	721
Kamerunio	-	3	3	Uzbekio	-	3	3
Kanado	93	65	158	Venezuelo	21	16	37
Karivadio	25	1	26	Vjetnamio	150	46	196
Kazahio	-	2	2	Zimbabvo	-	5	5
Kenjo	-	1	1				
Kolombio	50	7	57				
Kosovo	-	1	1				
				111 landoj	11264	5714	16978

LAŬKATEGORIA RESUMO DE LA MEMBRO-STATISTIKO

Kategorio	2001	2002	2003	
MG	437	410	375	
MJ	1317	1099	1197	
MJ-T	337	235	231	
MA	3219	2834	2799	
MA-T	201	161	139	
DM	565	860	843	
DM-T	22	18	23	
DMJ	7	19	26	
DMJ-T	-	5	6	
HM	63	61	65	
HP	11	11	10	
IM	6479	5713	5714	
AM	11137	9387	9356	
Junaj AM	1698	1162	1908	
MEMBROJ				
ENTUTE	19314	16262	16978	
DP		2	2	3
SZ		183	155	138
SA		175	164	140
KA		34	40	30
Kio		348	279	262
KKao		230	221	78
PT		90	82	71
DPT		17	17	18
KOTIZOJ				
ENTUTE	20393	17222	17718	

KLARIGOJ

MG	Membro-Gvidlibro
MJ	Membro-Jarlibro
MJ-T	Juna Membro-Jarlibro
MA	Membro-Abonanto
MA-T	Juna Membro-Abonanto
DM	Dumviva Membro
DM-T	Juna Dumviva Membro
DMJ	Dumviva Membro kun Jarlibro
DMJ-T	Juna Dumviva Membro kun JL
HM	Honora Membro
HP	Honora Patrono
IM	Individua Membro
AM	Aligita Membro
DP	Dumviva Patrono
SZ	Societo Zamenhof
SA	Simple abono Esperanto
KA	Kolektiva abono Esperanto
Kio	Abono Kontakto
KKio	Kolektiva abono Kontakto
PT	Patrono de TEJO
DPT	Dumviva Patrono de TEJO



La Estrara kaj la Ĝenerala Direktoro dum la aprila estrarkunsido. Supre: Andrej Grigorjevskij, Humphrey Tonkin, Lee Chong-Young, Osmo Buller, Gbeglo Koffi, Radojica Petrović (observanto, ILEI). Sube: Renato Corsetti, Ans Bakker-ten Hagen, Ivo Osibov, Sonja Petrović (observanto, TEJO) kaj Michela Lipari.

Memoro kaj prognozo

Raportas la respondecaj estraranoj kaj iliaj komisiitoj; redaktis Humphrey Tonkin

Enkonduko

Karaj membroj,

Estrara Raporto estas nur enrigardo kaj resumo de la abunda laboro de la Asocio dum la jaro, de la vidpunkto ĉefe de la respondecaj estraranoj. Tiuj estraranoj raportas ĉu abunde ĉu malabunde, kun forgesoj aŭ sen forgesoj, kaj la redaktoro (en la lastaj du jaroj la Vicprezidanto Humphrey Tonkin) bezonas ne nur tempon por la fizika laboro sed ankaŭ mensan energion por enŝtopi forgesitaĵojn kaj (eĉ pli malfacile) elasi informojn kaj observojn ofte interesajn kaj atentindajn, sed tro ampleksajn por la paĝolimo. Vi do rigardas ĉi tie nur palan bildon de la abunda laboro de via Asocio.

Malfacile tamen estas decidi, kio estas la aŭtentika laboro de la organizaĵo nomata Universala Esperanto-Asocio, kaj kio estas la laboro de ĝiaj ordinarnaj membroj, aŭ evoluoj de la Esperanto-movado ekster la kadro de la Asocio. Dum la malnovaj kaj tradiciaj strukturoj de laboro

- membroj, kottizoj, leteroj, presitaj tekstoj, poŝtaj voĉdonoj, cirkuleroj, fakaj asocioj, eĉ tradiciaj landaj asocioj - forfalas antaŭ la novaj - retmesaĝoj, retpaĝoj, retaj informoservoj, diskutejoj, elektronaj medioj, porokazaj kunlaboroj - fariĝas eĉ pli malfacile distingi la asocian laboron disde la movada ĝenerale. Kaj eĉ nia Asocio kaj la movado, kies parto ĝi estas, pli kaj pli proksime kunfandiĝas.

Sekve, la nuna raporto, kvankam ni klopodas klare indiki, kiu respondecis pri kio, ne ekskluzivas pli ĝeneralajn iniciatojn kaj agadojn ekster la tuja respondeco aŭ iniciato de la Estraro de UEA. Kvankam nia atento restas ĉefe sur la jaro 2003, ni ankaŭ konscias, ke tiu ĉi estos la lasta raporto de la nuna estraro, ĉar okazos elektoj de nova komitato kaj nova estraro en 2004. Pro tio, ni ankaŭ ĵetis atenton al tio, kion ni raportis en antaŭaj jaroj, kaj donas etan superrigardon de la taskoj farendaj en la lastaj monatoj de la nuna mandato kaj la nova deĵorperiodo de nova Estraro.

Kio do, pri la jaro 2003? Ĉu sukcesa por UEA kaj la Esperanto-movado? Sukcesa en pli granda kadro, sed plena, aliflanke, de malgrandaj misoj...

Kunlige kun la kompilado de la Estrara Raporto, oni utiligis diversajn ampleksajn raportojn pretigitajn kiel normalan parton de la laboro sed tro detalajn por aperigi tie ĉi. Tiuj kiuj deziras legi pli detale tiujn raportojn povas sin turni al la retejo de UEA, kie ili trovas:

La Afrika Agado en 2003: Tamenaj klopodoj, raporto de UEA-estrarano Gbeglo Koffi.

Esperanto kaj Sporto en 2003, raporto de UEA-estrarano Gbeglo Koffi.

Fakaj Asocioj dum la jaro 2003, raporto de komisiito de UEA pri faka agado Marija Beloŝevič.

Jarraporto de la Internacia Ekzamena Komisiono UEA/ILEI, 2003, verkita de Dunacn Charters, Prezidanto, IEK.

Jaro de tre granda informa laboro, sed samtempe jaro de tro oftaj etaj administraj informoj en la laboro de la Estraro kaj la Centra Oficejo.

Vi certe trovos, ke informado dum la jaro 2003-a rikoltis la unuajn fruktojn de la bona preparlaboro de la pasinta periodo. Aperis artikoloj en granda usona revuo kaj en brita gazeto kun la sekvo, ke ĉi tiuj artikoloj estis ree kaj ree presataj tra la mondo (oni parolas foje pri kultura imperismo en la amasmedioj, sed en ĉi tiu kazo ĝi estis avantaĝa al ni!). Aperis ankaŭ tutpaĝaj anoncoj en grandaj eŭropaj ĵurnaloj danke al la subteno de konata mecenato de la movado. La Brusela Komunikad-Centro gvidis esperantistojn pri kelkaj inform-kampanjoj, kun konsiderinda rikolto da artikoloj kaj arteletoj en multaj lokaj kaj naciaj gazetoj. En Bruselo oni komencis atenti pri ni, kaj la sekvoj estas kronike legebla en la ĉi-jaraj revu-numeroj.

Kvankam la eŭropa agado estas grava, ĉar la vastiĝanta Eŭropa Unio estas la plej intensa ekzemplo de novaj formoj de regiona kunlaboro, en kiuj Esperanto devus havi sian rolon, en ĉi tiu periodo de tutmondigo ankaŭ la Esperanto-movado tutmondiga. La lastaj informoj, kiuj atingas min parolas pri la komenciĝanta movado en Paragvajo kaj Indonezio.

La daŭrajn problemojn de administrado multaj membroj spertis. Feliĉe, multaj el tiuj problemoj estas nun survoje al definitiva solvo. Ili ja havis ankaŭ pozitivan flankon, ĉar ili sukcesis konvinki eĉ niajn tradiciulojn pri la neceso refari ĉiujn komputilajn programojn de la Asocio, kaj tio ekokazis. Ĉu vi jam vidis la pozitivan flankojn de tio, mi ne tute scias, sed certe la oficistoj jam vidis ilin. La komputila sistemo de UEA estis projektita kaj grandparte farita antaŭ kelkaj jardekoj kaj poste daŭre ĝisdatigata kaj iel subtenata per novaj lambastonoj. Ĝi tre bone servis la asocion dum longa tempo, sed ni forsalutis ĝin, kaj danke kaj kun iom da senstreĉiĝo. Kaj la libroserva parto de la nova programaro kaj tiu de la Universala Kongreso jam funkcias, kaj aliaj partoj estas nun farataj. En 2004 espereble sekvos solvo de la problemoj de la financa administrado de la Asocio. Mi ne volas nei, ke ĝi spertis malfacilaĵojn dum la pasintaj jaroj, kaj mi ree pardonpetas pro ili kaj dankas ĉiujn pro la tre granda komprenemo.

La finiĝinta jaro 2003-a estas karakterizata ankaŭ de vasta debato en pluraj forumoj de UEA pri la vojo irenda dum la venontaj jaroj kaj pri la uzo de la financaj rimedoj. La Komitato alprenis pasintjare en Gotenburgo saĝajn decidojn, kies efikojn ni vidos en la daŭro de la venontaj jaroj. Tiuj decidoj ĉefe rondiras ĉirkaŭ konceptoj de stabileco, kaj de konservado de nia potencialo por daŭra agado en la estonteco.

Tiu estonteccon la Asocio ĝenerale komencas fronti per pli optimisma rigardo, ĉar ni finfine komprenis ke tio, kio malkreskas, estas la kutimo pagi sian kotizon, dum tio, kio reale kreskas estas la nombro de homoj, kiuj lernas kaj praktikas Esperanton. Ni ankoraŭ ne trovis la plej bonan manieron plene ligi ilin al la tradiciaj strukturoj, sed eble tio ankaŭ ne plene necesas: ja la tradiciaj strukturoj devas ŝanĝiĝi. Kiel ekzemple vi

interpretus la informon, ke UEA havas nenium membron en Indonezio, sed ke dek indoneziaj registriĝis kiel kutimaj legantoj de la ret-pordego Gangalo? La tuja penso de mi, malnova movadano, estas: ni sendu al ili ĉirkluron por ke ili aliĝu, pagu sian kotizon kaj ricevu siajn membromarkojn. Mia dua penso estas, ke ilia laboro estas grava, en aŭ ekster la Asocio, kaj nia ĉefa tasko estas liveri al ili la rimedojn por informi, instrui kaj utiligi – tiuj tri ĉefaj taskoj preskribitaj en la Strategia Laborplano de nia Asocio – tiel ke ili povu iom post iom roli kiel plene potencaj, plene kontribuaj, kaj plene aktivaj membroj de nia eksterordinara rondo tutmonda.

Renato Corsetti, Prezidanto

1. La laboro

1.1. Planado

La laboro prezentata en tiu ĉi raporto de la estraro estas kompreneble rigardebla tra la prismo de la laborplano. La unua frazo de tiu laborplano (la Strategia Plano de UEA) diras, ke la Asocio celas grupigi la uzantojn de Esperanto, kiuj kunlaboras por ties progresigo en la vasta kadro de agado por pli justa mondo. La jaro 2003 prezentis grandajn defiojn al tiu agado por pli justa mondo, tiel farante nian laboron eĉ pli necesa kaj pli urĝa ol antaŭe.

Dum la jaro, la estraro, sub la gvido de nia prezidanto (kiu respondecas en la estraro pri la fako Planado), aparte emfazis en sia laboro la ĉefajn prioritatojn de la plano. En la raporto vi legas pri la progresoj en la tri agad-kampoj: informado, instruado kaj utiligado, kaj en la tri agad-direktaj: profesiigo, plijuniĝo, kaj tutmondigo. Ĉiuj ĉapitroj de la raporto estas bazitaj sur tiuj principoj.

Pri informado la plej granda sukceso estis la apero de favoraj informartikoloj kaj tutpaĝaj anoncoj en vaste legataj kaj vaste presataj gazetoj. La plej granda problemoj restas nia nekapablo konvinki esperantistojn informi daŭre pri Esperanto per profesie produktitaj materialoj kaj starigi sistemon de informaj fakoj en ĉiuj landoj. La laboro de kelkaj individuoj kaj de kelkaj asocioj restas elstara (kiel vi vidos ĉi-sube), sed multaj por la malfacileco de la tasko neniam akiris bonan nivelon de informado, kaj ankaŭ la speco de informoj, kiujn oni emas doni pri Esperanto suferis lastatempe pro la “morto” de ideologioj kaj utopioj. Esperanto, malgraŭ ĉio, restas unu el la grandaj utopioj – en plej pozitiva senco.

Nia klopodo doni al niaj Universala Kongresoj pli “klerigan” kaj “instruan” aspekton estas unu reago al tiuj ĉi bezonoj. La evoluigo de bonaj retaj rimedoj (elŝuteblaj dokumentoj, ekzemple) estas alia. Ankaŭ en la kampo de instruado la plej granda sukceso estas la definitiva

praktiko, estas foje malfacile distingi la agadon de UEA mem disde la agado de la unuopaj landaj asocioj aliĝintaj al UEA, aŭ de la fakaj asocioj, aŭ eĉ de sendependaj institucioj, kiuj tamen proksime rilatas kun la Asocio. Tiu ĉi raporto do prezentas bildon de la agado de UEA en la kunteksto de la ĝenerala laboro de la Esperanto-movado, ĉefe dum la jaro 2003.

Kio estas la Estrara Raporto?

La Estraro de UEA ĉiujare pretigas raporton “pri la agado de la Asocio” dum la antaŭa jaro. La raporto estas diskutata de la Komitato de UEA kiam ĝi kunvenas dum la Universala Kongreso de Esperanto. Principe la raporto kovras la antaŭan kalendaran jaron kaj ĝi traktas tiujn agadojn, kiuj estas rekte ligeblaj al la Asocio. Tamen, en la

konkero de la virtuala spaco. La interreto abundas je kursoj kaj aliaj materialoj en Esperanto, multe pli ol unu homo povas legi dum sia tuta vivo. La plej granda problemoj restas la pli tradicia instruado kaj lernado: malfacilo konvinki gepatrojn kaj lernantojn antaŭ ol konvinki lernejarajn instancojn havi pli vastan instruadon de Esperanto en lernejoj.

Se temas pri utiligado, ni povas diri, ke neniam antaŭe en la historio de la lingvo, ĝi estis tiom uzata en ĉiu momento de la tago kaj de la nokto en ĉiu angulo de la mondo. Reta dialogo per mesaĝoj, per babilejoj, kaj per aliaj retaj iloj estas tre, tre intensa en la nuna momento. Je iu ajn momento oni povas aŭskulti bonan Esperanton en sia hejmo per retigitaj radioelsendoj, kompaktaj diskoj, ktp. Granda problemoj, tamen, restas la utiligado de Esperanto por praktikaj celoj, kiu ankoraŭ ne elkreskis el sia beba stato. Malgraŭ kuraĝaj iniciatoj la utiligo de Esperanto en la komerc, ekzemple, restas tre limigita.

Kunlige kun la problemoj de utiligado ni povas diri ke la samajn problemojn spertis profesiigo. Multaj elstaraj homoj sukcesaj en siaj profesioj lernas Esperanton kaj iĝas esperantistoj, sed profesiigo pere de la movado restas io marĝena.

Plijuniĝo de la movado progresas en videbla maniero en la evoluantaj landoj kaj en kaŝita maniero en la evoluantaj landoj, kie la junaj homoj lernas Esperanton sed ofte ne aperas en niaj renkontiĝoj, preferante sian virtualan mondon. La nuna raporto tamen donas bonan enrigardon al la intensa junulara agado.

Tutmondigo, kiel vi legas en aliaj partoj de la raporto (notinde pri Afriko), rekomencis sian marŝon ankaŭ rilate al Esperanto. Tiurilate la ĉefaj problemoj estas financaj, ĉar ni volus fari multe pli ol niaj rimedoj permesas – kvankam ankaŭ la malfacileco de nia nuntempa mondo malfaciligas vojaĝadon, metas barilojn antaŭ la profesiaj aspiritoj, ekzemple de tiuj eksterteropanoj, kiuj ŝatus labori en Roterdamo sed ne povas pro regionaj leĝaj limigoj, kaj daŭre forprenas tiun travivon kaj liberan tempon necesan por plene ĝui la plezurojn kaj defiojn de la esperantisteco.

1.2 Informado

Ne estas eble ene de unu malgranda raporta ĉapitro doni kompletan superrigardon de la abunda informa agado farita dum la jaro, sub gvido de la respondeca estrarano Andrej Grigorjevskij. Ĝi evoluis en plej diversaj manieroj – per rekta informa agado de la Centra Oficejo (aperigo de dokumentoj), distribuo de informoj, liverado de informmaterialo pere de la ĉiam ekspansianta retpaŝaro de UEA, kien aktivuloj povas sin turni por ricevi elŝuteblajn informilojn kaj dokumentojn en pluraj lingvoj), per la Brusela Komunikada Centro (projekto de Eŭropa Esperanto-Unio, sed financata ĉefe de subvencio de UEA), per la landaj asocioj (kelkaj el kiuj regule aperigas revuojn taŭgajn por ekstermovada distribuo, aŭ funkciigas Esperanto-kursojn, aŭ eldonas gazetarajn bultenojn), per la fakaj asocioj, kaj, precipe, per la simplaj membroj de la Asocio, kiuj entuziasme rebatas misinformojn en la gazetaro, verkas kaj publikigas siajn artikolojn pri Esperanto, agadas en lokaj grupoj kaj en lernejoj, kaj stimulas publikan debaton pri Esperanto kaj pri lingva egaleco. En 2003 estis plene reaspektigita kaj rearanĝita la retejo www.uea.org, kiu ricevis pli modernan kaj profesian aspekton, preparitan de Dirk Bindmann, kaj je triono pligrandiĝis en sia informa enhavo.

Kaj la retejo de UEA ja ne estas la sola. Ekster la kadro de UEA, grava impulso por Esperanto-aplikado kaj informado en la reto iĝis du novaj sendependaj projektoj aperintaj en 2003: novaĵ-portalo *Gangalo* kaj *Libera Folio*. La unua strebis pleniĝi la niĉon de ĝenerala novaĵliverado (kaj plenumas tiun rolon elstare), kaj la dua analizi movadajn problemojn kaj atentigi pri ili la publikon. UEA-temoj kaj membroj grave rolis en ilia informa plenumo, kaj ambaŭ retejoj ludis sian rolon en la debato ĉirkaŭ personaraj kaj strategiaj ŝanĝoj en UEA. La propra aplikada projekto de la informfako de UEA www.abonu.com daŭre funkcias en 2003 sen grandaj ŝanĝoj kaj iom post iom kolektis pli ol 1000 abonantojn. Stabile funkcias alia propra retroprojekto de UEA, www.Esperanto.net, kiu restas la plej konata informa retejo pri Esperanto.

La plej rimarkinda eksterreta informa agado de la jaro evidente estis la pagata anonca kampanjo en gravaj eŭropaj tagĵurnaloj, okazinta meze de 2003 kaj financita de japana entreprenisto-esperantisto Miyoshi Etsuo. Verŝajne dank' al ĝi kaj bone kunordigita agado de la Brusela Komunikada Centro la Universala Kongreso en Gotenburgo ricevis elstare bonan reŝon en la mondaj amaskomunikiloj (vidu sub Kongresoj). La Gotenburga UK estis diskonigata tutmonde ankaŭ inter la esperantistoj, kiuj ne povis veni al Svedio. Por tio servis profesie preparita kaj ĉiutage aktualigata retejo, dediĉita al la kongreso.

Kvankam tiuj agadoj okazas pli-malpli sendepende de UEA (tamen ili ofte uzas informojn liveritajn de la Asocio), indas menci la ĉiam fidelan kaj efikan agadon de tiuj, kiuj redaktas kaj distribuas naĉlingvajn informilojn kaj periodaĵojn pri Esperanto, tiujn, kiuj prizorgas radio-programojn en Esperanto, kaj tiujn, kiuj formulas kaj diskutigas la argumentojn kaj la strategiojn, kiujn ni bezonas por efike agadi kaj informadi.

1.3 Instruado

Konforme al interkonsento de 1990, la edukana kampon de UEA prizorgas Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj, laŭ kiu la estraro de UEA donas ankaŭ en 2003 financon subvencio al ILEI kaj akceptis inter si reprezentanton de ILEI, Mauro La Torre en la komenco de la jaro kaj Radojica Petrović, prezidanton de ILEI, ekde aŭgusto. ILEI prizorgas siajn sekciojn kaj reprezentantejojn en diversaj landoj, kunlaboro, interalie, kun la kontinentaj kaj regionaj komisionoj de UEA, pere de kiuj ILEI alproksimiĝis al la instrua agado en landoj, kien ĝi antaŭe ne eniris (ekzemple Pakistano, Maroko, Dominika Respubliko).

La instruadon de lingvoj ĝenerale karakterizas rapida evoluo de instruteknoj, kaj metodika progreso kun emfazo de edukado al interkultura kompetento. La Esperanto-edukado evoluas konforme al tiuj tendencoj. Interretaj kursoj kaj aplikoj en la kampo de interkultura edukado ne nur pliriĉigas la enhavon kaj rimedojn de Esperanto-instruado, sed ankaŭ malfernas novajn vojojn por disvastigi Esperanton interalie per kunlaboro kun ekstermovadaj kolegoj kaj institucioj.

Kadre de la projekto *Lugatu-salam* okazis kurso en Maroko, kaj subtene de *Zaban-e-salam* kaj la ILEI-Sekcio en Irano okazis kursoj en novembro en diversaj urboj en Irano por afganaj rifuĝintoj. Plie, la Biblioteko de la Universitato de Kabulo ricevis instrumentalarion en la araba kaj Esperanto. Kunlaboro kun la branĉo *Lernejoj por Evoluoj* de *Agado Espero* kaj de *Internacia Esperanto-Instituto*, estis subtenata

okazoj de Esperanto-kursoj en lernejo en Kolombio kaj esplorataj la ebloj en Albanio, Burundio, Mongolio kaj Tanzanio.

La strategia plano de UEA antaŭvidas daŭrigon de la kunlaboro UEA/ILEI kun emfazo je (1) komputil-retaj kursoj kaj servoj, (2) pluevoluigo de ekzistantaj centroj por instruado de Esperanto, (3) produktado de lerniloj por landoj kaj lingvoj, kie ili mankas, (4) subteno al la projekto **Interkulturo** de ILEI, kaj (5) komuna laboro de UEA kaj ILEI por starigi programon de instruista trejnad. Jen la ĝisnuna progreso:

(1) Retaj kursoj pli kaj pli abundas. La Amerika komisiono jam havas propran sistemon de ofertataj retkursoj kaj ankaŭ la Afrika komisiono proponas ion en tiu tempo. La de ILEI-aŭspiciataj retejoj **edukado.net** kaj **lernu.net** disponigas multajn alirojn al lernado, kaj UEA daŭre instigas krei novajn aŭ traduki jam ekzistantajn kursojn en la lingvoj por kiuj ili ne ekzistas. Krome, kiel ni notas ĉi-sube, la Amerika komisiono de UEA lanĉis du instruoprojektojn, KORE kaj NESTO, kunlabore, interalie, kun la ILEI-Sekcio en Brazilo. Ili kalkulas je vasta nombro de instruistoj-korektantoj.

(2) Pluevoluigo de ekzistantaj instrucentroj okazas per starigo de retejoj pri Esperanto-centroj kaj kursejoj. Ĉe <http://www.tejo.org/uea> troviĝas informoj pri tiuj kursejoj – kalendaro, programoj, ktp. Ĉiu respondeculo povas mem ĝisdatigi informojn pri sia kursejo aŭ turni sin al la afrika oficejo de UEA, afrika.oficejo@uea.org, kiu zorgas pri tio.

(3) UEA kaj ILEI spronas landajn asociojn havi ankaŭ surpaperajn lernilojn en sia nacia lingvo. Kvankam la eldona fako de ILEI plue klopodas por aperigo de novaj verkoj, en novaj lingvoj, neniu povas aperi en 2003. Tiu projekto havas propran hejmpaĝon: <http://ikso.net/ilei/index.php?lingvo=eo>. Revizio de la gvidilo de la internaciaj ekzamenoj estas pridiskutata. La periodaĵoj *Juna Amiko* kaj *Internacia Pedagogia Revuo* regule aperis en la jaro.

(4) La projekto **Interkulturo** (IK) signifis evoluis, en kunlaboro ankaŭ kun TEJO (vidu sube). Lernejoj tra la mondo estas registritaj. Esperantic Studies Foundation disponis subvencion al ILEI por la progresigo de la laboroj. IK nuntempe arigas 12 grupojn en 10 landoj; kunlaboras ankaŭ 19 grupgvidantoj el 17 landoj kaj 10 helpantoj en 7 landoj.

(5) Klopodoj por starigi la programon **Trejnkurso** pluiras. Por tio ILEI havas nun estrararon pri instruoprogramoj. La jaro 2004 nepre alportos novaĵojn.

Krome, ni menciuj aliajn aferojn, kiuj okazis ĉe la instrufako de UEA aŭ/kaj koncernas Esperanto-instruadon tra la mondo. En Svedio okazis la 36-a ILEI-konferenco, ĉe kiu elektigis nova estraro, kiun stiras prezidanto Radojica Petrović. ILEI lanĉis sian novan laborplanon kaj varbkampanjon por plivastigi la membraron. Ĝi starigis kunlaboran rilaton kun E@L, kun kiu ĝi lanĉis la projekton Flugiloj de Malfacila Vento, kiu celas instrukapabligon de junaj esperantistoj, kun rete atingebla metodika materialo kaj ekzamsistemo aplikebla rete kaj ĉe junularaj aranĝoj.

La de UEA eldonita libro *Vojaĝo en Esperanto-lando* de Boris Kolker estas vaste uzata por prepari la ekzamenojn de UEA/ILEI, tiel ke ĝi atingis pinton lokon inter la plej vendataj libroj de la jaro en la Libroservo de UEA.

Renoviĝis la konsisto de la Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) sub prezidanto Duncan Charters. Kontentige progresis la organizado de ekzamen-sesioj kaj kreado de novaj ekzamenoj laŭ profesiaj normoj. Fine de la jaro, la Internacia Rajtigita Ekzamenantaro konsistis el 72

membroj el 31 landoj. Okazis kiel kutime ekzamen-sesio ĉe la Universala Kongreso. Aliaj ekzamen-sesioj okazis en Antananarivo (Malagasio) en aprilo, en Assoukopé kaj Lomé (Togolando) en aŭgusto, kaj en Aneho (Togolando) en decembro. Tamen, restas multaj problemoj ankoraŭ pritraktendaj. Gravas ke IEK elpaŝu por preni siajn respondecigojn firme apogita de ILEI kaj UEA, kaj prilaboru ĝis realigo iniciatojn kiel la prioritata Ekzameno pri Instrukapablo de Esperanto.

Katalin Kováts, kiel redaktoro de Edukado.net kaj vicprezidanto de IEK, enretigadis informojn pri IEK kaj multajn specimenaĵojn tekstojn elŝuteblajn de instruistoj kaj kandidatoj en pdf-formato. Tiuj tekstoj komencis prepariĝi dum la dua parto de 2003, ĉefe per kunlaboro de Bill Maxey, sekretario de IEK. Oni atendas almenaŭ ĉiujare aldoni novajn materialojn. En rilataj retlistoj de ILEI okazis ampleksaj diskutoj pri la sistemo, enhavo kaj principoj de ekzameno. La preparigo de kandidatoj kaj rimedoj plifaciligis la preparon kaj ekzamenigon. Partoprenis akademiigo, gvidanto de universitataj Esperanto-programoj, la ekza kiu nuna prezidanto de ILEI, la prezidanto de UEA, kaj membroj de IEK. Ĉefe spronis pliprofundigon de la diskutado eseo de Maxey (vidu ĉe: http://www.ikso.net/ilei/ipr/opinio_de_maxey.html). Rezulte, pliklarigis supozoj kaj atendoj de la koncernaj diskutantoj kaj la grupoj kiujn ili reprezentas – kio helpas ellabori la prioritatojn de IEK laŭ realeca programo konsekvenca kun niaj rimedoj kaj homfortoj.

En sia raporto pri IEK, d-ro Charters mencias i.a. la jenajn prioritatojn por 2004: Ellabori planon por krei kaj administri Ekzamenon pri Instrukapablo de Esperanto; atenti la bezonojn de difinitaj grupoj kaj individuoj kiuj ne havas facilan aliron al rimedoj por prepari sin por la ekzameno; revizii la gvidlibron *Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA*; preparadi novajn ekzamenojn kaj evoluigi la programon laŭ profesiaj normoj.

Germajn Pirlot daŭre kompilas liston de supera instruejoj (universitatoj, institutoj, altlernejoj k.s.) kie Esperanto estas oficiale instruata. La listo certe ne estas ankoraŭ kompleta: kompletigojn oni sendu al gpirlot@esperanto.org, de kiu la raportado estas havebla kiel 19-paĝa Word-dokumento. Laŭlande, okazas almenaŭ unu oficiala kurso en superaj edukejoj en Aŭstrio (3), Belgio, Brazilo, Bulgario, Ĉeĥio (2), Ĉinio (18), Germanio (5), Hispanio (2), Hungario (2), Israelo, Italio, Japanio (2), Korea Resp. (2), Kostariko (2), Litovio (3), Meksiko, Nederlando, Pollando (3), Rusio (4), Slovakio, Svedio, Usono (5) kaj Uzbekio – sume 63 en 23 landoj (43 en 20 landoj en 2002).

La kampanjo **Esperanto en la Bibliotekoj** akiras ĉiam pli klaran strukturon, nun sub gvido de komisiito Aloisio Sartorato (ludoviko44@yahoo.com.br). La kampanjon partoprenas jam kelkaj centroj en la mondo, krom la Kultura Kooperativo de Esperantistoj en Rio de Janeiro, kaj daŭre serĉas novajn kunlaborantojn kaj mecenatojn.

1.4 Faka agado

La faka agado de la Asocio okazas precipe pere de asocio aligintaj al UEA aŭ kontrakte kunlaborantaj. Ĝi stimulas organizigon de apartenantoj al diversaj fakoj por praktike utiligi Esperanton en siaj respektivaj interesokampoj, por evoluigi la lingvon kaj pretigi ĝin por plene funkcii en ĉiuj aspektoj de la internacia vivo, kaj por prezenti ĝin kiel taŭgan komunikilon al neesperantistaj samfakuloj. Por ĝenerala

interŝanĝo de opinioj estas uzata retlisto *utiligado-de-esperanto_faka-agado@yahoo.com*. Marija Beloŝević, kiel komisiito pri faka agado ekde la mezo de 2003 (laborante sub gvido de Ivo Osibov, estrarano pri faka agado), kontaktadis la fakajn asociojn, kolektis informojn pri iliaj agado kaj problemoj, partoprenis iliajn listojn, komencis ordigi datumbazon pri ili, kaj provizis informojn pri ili al la (reta) Vikipedio. La nombro de la fakaj asocioj kiuj kontrakte kunlaboras kun UEA kreskis je unu per akcepto de kontrakti pri kunlaboro kun la Ligo Humanitas. Kelkaj fakaj asocioj renkontis problemojn en sia funkciado. Tiel Kristana Esperanto-Ligo Internacia, ne trovinte kandidatojn por prezidanto, prokrastis la elektojn, kiuj devis okazi en 2003. Ankaŭ la Asocio de Sociallaboristoj ASLE, ne trovinte kandidatojn por la nova estraro, decidis ke la asocio estu ripozanta ĝis la venonta kunveno en Vilnius, 2005, kiam oni decidis pri la estonto. Ankaŭ MEL (muziko) trairas krizon. La plej bedaŭrinda afero estas la formala malfondo de la ĵurnalista asocio TEJA, unu el la plej malnovaj fakaj asocioj, fondita en 1948 kaj ekde tiam kunlaboranta kun UEA. Nun, kiam la informado pri la internacia lingvo disfloras, kiam aperas novaj formoj de informiloj en Esperanto ne nur primovadaj, kiel retaj gazetoj kaj aliaj elektronaj rimedoj, tia asocio devus esti aparte bezonata. Aliflanke, pluraj fakaj asocioj starigis proprajn retejojn, kaj ankaŭ ekstis aŭ daŭris, ĉu ene de la fakaj asocioj ĉu ekster ili, dudeko da retaj diskutlistoj pri fakaj temoj kaj similaj agadoj.

Ankaŭ la junulara movado havis rimarkeblan fakan agadon dum la jaro 2003. Internacia laborgrupo Esperanto@Interreto, kunordiganta plurajn retajn Esperanto-projektojn, iĝis faka sekcio de TEJO, kaj la ĵamaj fakaj sekcioj BEMI (biciklistoj) kaj EUROKKA (muzikistoj) aktive laboris dum la jaro. Dum la Universala Kongreso en Gotenburgo okazis 36 kunvenoj de diversaj fakaj asocioj. Kunlabore kun la lokaj radioamatoroj, ILERA starigis dumkongresan amatoran radio-stacion. Aparte menciindaj estas programeroj direktitaj al la neesperantista publiko ekster la kongresejo. IKUE (katolikoj) kaj KELI okazigis ekumenan diservon. IKEF (komerco kaj ekonomio) havis prezenton de la sveda ekonomio en la Komerca Altlernejo. UMEA (medicino) gastis ĉe la Universitata Klinikon. Per tiaj publikaj aranĝoj oni obligas konatigojn kun kongreslandaj gekolegoj, kun la samfakaj renkontataj problemoj kaj la maniero solvi ilin en la koncerna lando kaj samtempe prezentas Esperanton al neesperantistaj samfakuloj plej konvinke atestante pri ĝia praktika utiligeblo. Konforme al la decido de la komitato estis senpage disponigita budo en la kongresejo. Al la demando pri uzo de la budo pozitive respondis 10 fakaj asocioj, kaj du aliaj havis propran budon. Dum la jaro revokiĝis granda intereso pri terminologia evoluigo. Multaj mesaĝoj estis interŝanĝitaj en diversaj listoj. Pluraj agopretaj personoj anonciĝis. Aperis ses numeroj de elektronika bulteno dank' al modela laboro de Luko Jasumora. En la tempo de klopodoj akceptigi Esperanton en la Eŭropa Unio, preparado de adekvataj terminaroj diversfakaj montriĝas urĝa neceso. La Asocio devus sproni kaj prizorgi revivigon de laboro de la Terminologia Centro.

En 2003 lanĉiĝis projekto, gvidata de Tim Morley, kiu celas esperantigi la programaron OpenOffice. La estraro de UEA decidis doni aŭspicion por tiu ĉi projekto. Estrarano Gbeglo Koffi aparte laboris super la rolo de Esperanto en la sporta medio. Kvankam jam eldoniĝis eĉ libroj pri sportaj terminoj, kaj esperantistoj disdonadis esperantaĵojn dum sportaj renkontiĝoj; kvankam kreiĝis ankaŭ sportaj kluboj de esperantistoj, kiuj partoprenas tumirojn organizitajn de neesperantistoj, ĝis nun Esperanto

ne bone penetris la sportan medion. En la jaro 2003 okazis pliaj klopodoj.

En Korea Respubliko, post la sukcesa sperto uzi Esperanton por la lernado kaj disvastigo de la plej malnova tradicia korea batalarto Teggjon, naskiĝis la ideo fondi tutmondan sportan asocion MELMS (Monda Esperantista Ligo por Memdefendarto) kaj Sportoj, kontaktebla ĉe rita@eses.net aŭ senfine@yahoo.com. Kio grandigos la eblon disvastigi Esperanton uzante la kampon de sportoj kaj memdefendarto. La unuaj membroj estas gesamideanoj el Brazilo, Koreio, Germanio, Svislando, Togolando, Zimbabvo, Hungario, Japanio, Francio kaj Mongolio. Gvidanto estas Klarita Velikova. Alia klopodo en tiu ĉi sfero estas iniciato de Eugeno S. Perevertajlo (Uzbekio) pri la projekto "Esperanto-Sporto". Naskiĝis diskutlisto *per-esperanto-sporto@yahoo.com*. Inter sportaj ludoj dum la jaro, citindas la matĉoj de esperantistaj futbalteamoj en Togolando kaj D.R. Kongolando. Krome,



Brazilaj esperantistoj ludas futbalon.

Korea Asocio de Teggjon metis en sian edukoprogramon prelegojn pri Esperanto por siaj 111 trejnistoj. La Grand-Majstro de Teggjon Lee Yong Bok intencas partopreni kun profesia teamo en la Pekina Universala Kongreso kaj subteni la iniciaton fondi sportan lunion.

Malfacilas priskribi en kelkaj linioj la mirindan agadon de s-ro Wu Guojing, komisiito de UEA pri ĝemelaj urboj. Tiuj formalaj ligoj inter urboj en diversaj partoj de la mondo estas jam firme establitaj en la neesperantista mondo: s-ro Wu, sub egido de UEA, nun klopodas ĝis maksimumo ekspluati tiujn kontaktojn ankaŭ por Esperanto. Li regule eldonas retan cirkuleron, en kiu aperas raportoj pri establitaj kontaktoj kaj invitoj krei novajn, kaj li stimulis aperigon de la revuo *Pontoj*, kiu raportas pri tiu laboro per kulturaj k.s. artikoloj. Inter la diversaj unuaj sukcesoj de la programo estis ekzemple kunlaboro inter la esperantistoj de la urbo Weston-super-Mare, Britio, kaj Hildesheim, Germanio.

Kio pri la estonteco de la agado sur tiu ĉi kampo? Necesas stimuli organizigon de fakuloj en gravaj fakoj en kiuj asocioj ankoraŭ ne ekzistas, trovi adekvatajn manierojn por helpi al la asocioj kiuj travivas malfacilaĵojn, kaj instigi kaj plivastigi kunlaboron kun neesperantistaj samfakuloj en landoj kie esperantistaj fakaj asocioj kunvenas.

1.5 Kulturo

Respondeca estrarano estis Humphrey Tonkin. Malgraŭ la akcepto en 2002 de ambicia plano por evoluigo de la Esperanto-kulturo en la kadro de UEA, la internaj organizaj problemoj de la Asocio kaj la severaj financaj premoj limigis la progreson. Oni povas legi aliloke en tiu ĉi raporto pri la eldona agado de la Asocio: en 2003 la estraro fine akceptis eldona politikon por la Asocio, sed restas ankoraŭ la demando realigi pli perspektivan eldona planon laŭ tiu akceptita politiko. Certe tio estos unu el la prioritatoj de la nove instalita ĝenerala direktoro de UEA.

En la 87-a Universala Kongreso en Gotenburgo okazis, kiel kutime, abundaj kulturaj programeroj, interalie teatraj prezentoj de La Kabaredo en kiu ĉefrolis Saša Pilipović (TEJO-veterano kaj ofta ludanto en kongresoj, nun profesia aktoro) kaj Sanja Matejić, kaj teatra versio de la versa epopeo de Harry Martinson, *Aniara*, en traduko de William

Auld. Okazis pluraj koncertoj kaj recitaloj, la kutimaj Nacia kaj Internacia Vesperoj, kaj la anonco de premiitoj de la Belartaj Konkursoj. Ĉi-lasta kunveno estis riĉigita de prezentoj de nunaj kaj iamaj premiitaj verkoj, inkluzive de legado de teatraĵo de Paul Gubbins. La ĉefa novaĵo tamen estis la t.n. Kleriga Dimanco, kiu donis okazon por pluraj kunsidoj en kiuj verkistoj parolis pri sia verkado, oni pridiskutis Esperanto-literaturon, kaj la publiko enprofundiĝis en la Esperanto-kulturon. Tiun eksperimenton oni ripetos en 2004 en Pekino.

Sed eble la plej signifa kontribuo de la Asocio al la kulturo okazis ĝuste en la Centra Oficejo, kie Marcus Ziko Sikosek estis dungita, pere de ekstera monfondo, por reordigi la Bibliotekon Hector Hodler, unu el la trezoroj de la Asocio. La biblioteko jam de jardekoj (argumenteblaj jam de la komenco antaŭ cent jaroj) suferas pro manko de adekvataj homaj kaj financaj rimedoj, tiel ke ĝia utiligeblo reduktiĝis kaj ĝi fariĝis ŝarĝo al la Asocio anstataŭ fruktodona investo. Tion oni nun komencas ŝanĝi. S-ro Sikosek unue inventariis la havaĵojn de la biblioteko kaj la arkivo de UEA, kaj poste pretigis raporton kaj rekomendaron pri kiel trakti tiujn diversajn objektojn. La tuta valorega kolekto de la iama Magnetofona Servo de UEA, ekzemple, atendas ciferecigon (se estos trovbla la mono por tio...); ĝi estas ankoraŭ savebla, sed la primitivaj surbubenaj bendoj ne longe eltenos. Ankaŭ multaj libroj atendas riparon kaj la kolekto kiel tute bezonas diversajn kompletigojn. La tuta situacio alprenis certan urĝon pro la planoj renovigi la Centran Oficejon – kio antaŭvidas translokadon de la biblioteko en pli taŭgan parton de la domo. Sed la estonteco de la biblioteko dependos de la preteco de niaj membroj konservi kaj utiligi tiun ĉi historian investon. Inter la planoj de s-ro Sikosek estas lanĉi organizaĵojn de Amikoj de la Biblioteko, sisteme serĉi financajn heredaĵojn por doni pli firmajn financajn bazon, transmeti en pli konsulteblajn formojn diversajn riĉaĵojn en la kolekto (la nova serio de kompaktaĵoj diskoj, menciita sube, estas unu ekzemplo) – kaj sekurigi la postenon de bibliotekisto, tiel ke ni ne denove trovu nin en situacio, en kiu ne eblas prizorgi tiun nian konservejon de la historio – kaj minejon por konstrui estontecon.



Ziko M. Sikosek

rezolucio pri tiu temo estis direktita al eksteraj organizaĵoj, inkluzive UN kaj Unesko.

La organoj de la Asocio plenumis dum la kongreso siajn statutajn laborojn. Pri la komitato vidu aliloke en la raporto. La estraro kunsidis ĉiutage krom merkredo, dum entute 10 horoj. La kongreso laboris kiel kutime en diversaj sekcioj, forumoj, kunvenoj ktp, okupiĝantaj pri movadaj problemoj, la lingvo, scienco, kulturo, kongreslando. Internacia Kongresa Universitato kaj Akademio Internacia de Sciencoj okazigis 3 komunajn sciencajn prelegojn kaj IKU mem 6 pliajn.

Ankaŭ la Belartaj kaj Oratora Konkursoj trovis lokon en la kongresa programo. La kongresanoj ĝuis 2 teatraĵojn kaj kelkajn koncertojn, kaj naciajn kaj internacian artajn vesperojn. La junularo organizis sian parton de la programo inkluzive publikan koncerton. Entute 1800 lokoj en 41 ekskursoj estis venditaj. La aŭkcio kolektis preskaŭ 18 000 svedajn kronojn kaj la Libroservo enkasigis pli ol 25 mil eŭrojn. La venonta kongreso okazos en Pekino (24-31 julio 2004) kaj la postvenonta en Vilno, Litovio (23-30 julio 2005). La estraro decidis ke la 91-a Universala Kongreso okazos en Florenco, Italio, en 2006, kaj principe akceptis inviton okazigi la 92-an Universalan Kongreson en Jokohamo, Japanio, en 2007.

Apertajn dankojn pro la sukcesoj en Gotenburgo meritas la modele laborinta Loka Kongresa Komitato sub prezido de Roland Lindblom, kaj s-ro Clay Magalhães, kiu, post ekŝigo de la antaŭa Konstanta Kongresa Sekretario Nikola Rašić, rapide kaj glate transiris el sia rolo kiel asista KKS en la planan sekretariecon. Surbaze de la sperto en Gotenburgo, eblas daŭrigi ŝanĝojn en la kongresa programo por adapti ĝin al novaj ebloj kaj bezonoj de la movado kaj movadanoj.

1.7 Eksteraj rilatoj

Lee Chong-Yeong rolis kiel estrarano pri eksteraj rilatoj, kun helpo de la prezidanto Renato Corsetti. Kvankam la laboro de UEA pri eksteraj rilatoj (rilatoj kun aliaj organizaĵoj) estas tutmonda, ĝi ĉefe koncentriĝas en kelkaj ŝlosilaj urboj – ĉe UN en Novjorko kaj Genevo, ĉe Unesko en Parizo, ĉe la Eŭropa Unio en Bruselo, ktp. Kunlaboras en Parizo Renée Triolle; Mireille Grosjean reprezentas nin en Genevo; Rochelle Grossman prizorgas la agadon en Novjorko. Sed la Asocio urĝe bezonas pli da helpo en tiuj kaj aliaj urboj.

En Bruselo, sub aŭspicio de kvar Eŭropaj Parlamentanoj, plentaga simpozio pri "Kiaj lingvaj politikoj en multlingva Eŭropa Unio?", ĉefe iniciatita de Michael Cwik de la Laborgrupo por Lingvaj Problemoj de EU kaj finance subvenciita de Miyoshi Etsuo, okazis en la Eŭropa Parlamentejo en Bruselo (6 majo). Sub prezido de parlamentano Michael Gahler, konkludoj pri komunikaj principoj en multlingva komunumo kiel la EU estis akceptitaj de la proksimume 70 partoprenantoj (detaloj ĉe <http://www.cwik-online.net>).

Niaj formale agnoskitaj rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj daŭras. Philippe Chavignon reprezentis UEA ĉe laborgrupoj kadre de la Jardeko de UN pri Indiĝenaj Popoloj, 19-24 julio 2003. UEA estis rekomendita kiel kandidato por la 20-kapa estraro de CONGO (Konferenco de Neregistraj Organizaĵoj), sed la rekomendo montriĝis nevalida pro teknika kialo. Ni denove provos en 2006.

Ankaŭ ĉe Unesko la formalaj rilatoj daŭras. La kroata registaro, laŭ iniciato de Spomenka Stimec, rekomendis UEA al Unesko kiel kandidaton por la Pacpremio Felix Houphouët-Boigny, pro ĝia kontribuo al internacia kompreniĝo kaj paco. La Dialogo Inter Kulturoj, lanĉita de UN kaj Unesko antaŭ kelkaj jaroj, en kiu UEA ludas aktivan rolon, rezultigis apartan subvencian programon por t.n. kulturaj heredaĵoj, en kiu kandidatoj la 90-jara tradicio de la Universala Kongreso de

Esperanto. Formalan proponon UEA esperas sendi al Unesko en majo 2004. En Londono en novembro, kunveno de la Mondfederista Movado akceptis rezolucion favoran al instruado de Esperanto, laŭ iniciato de Miyoshi Etsuo kaj Ronald Glossop, kun helpo de la Esperanto-Asocio de Britio kaj Londona Esperanto-Klubo.

Jam realigitaj planoj por 2004 inkluzivas agadon dum la Monda Socia Forumo en Mumbajo, Barato, en januaro, kaj preparlaboron por la 3-a Nitobe-Simpozio pri Lingvaj Problemoj de Internaciaj Organizaĵoj, kiu okazos kadre de la Universala Kongreso en Pekino. Unesko, EU kaj la Mondfederista Movado promesis sendi siajn reprezentantojn al la simpozio, kaj respondoj de UN kaj la Alta Komisiono pri Homaj Rajtoj estas atendataj.

Krome, dum 2003 TEJO daŭrigis plurjaran tradicion de reprezentado de esperantistaro en internaciaj junularaj konferencoj dise en la mondo, kaj fruktodonan flegadon de kontaktoj kun diversaj ekstermovadaj fondaĵoj.

1.8 Landa kaj regiona agado

La komplikan rolon de kunordiganto de la landa kaj regiona agado supergardiĝas kaj kunordigis estrarano Michela Lipari. La laboro evoluis sur pluraj paralelaj vojoj: la formalaj kaj rutina kunordigado de rilatoj kun la landaj asocioj pere de la Centra Oficejo, la evoluiga laboro precipe per la regionaj komisionoj de UEA, kaj plej diversaj kontaktoj surbaze de intervenoj de nia estrarano, regionaj agadoj iniciatitaj de landaj asocioj, k.s. (aparte menciindas la laboro inter ĝemelaj urboj, raportita en la ĉapitro pri faka agado). Por Afriko la Asocio havis sian apartan estrararon, sed tie ankaŭ laboris komisiono. Jen raporto laŭ regionoj.

Afriko

Kiel atentigas Gbego Koffi, estrarano respondeca pri afrika agado, la ĉefaj rubrikoj de la agado en Afriko estas, konforme al la strategia plano de UEA, informado, instruado kaj utiligado de la lingvo. Ĉe ĉiu el la tri rubrikoj la agantoj de la movado en Afriko provis ion fari. La afrikaj oficejo kaj komisiono, landaj asocioj kaj afrikaj kluboj, kaj eĉ eksterafrikaj esperantistoj kaj Esperanto-organizaĵoj partoprenis en la agado. Plej granda malhelpo estas manko de financaj rimedoj.

En la jaro la afrika fondaĵo ricevis malpli ol 4000 eŭrojn kiel donacojn, sed la bezonoj eĉ post reduktu sumiĝis je 11 000 eŭroj. Minacas malkresko de agado sur la kontinento, se la esperantistaro ne tuj trovos rimedojn. Certe neniu ŝatus, ke Esperanto malaperu en Afriko. Ja nur lastatempe, dank al la diligenta laboro de kelkaj pioniroj, ĝi komencis flori. Efektive, la pli fora estonteco aspektas iom pli hela: dum la jaro la Afrika Kapitalo kreskis de 24 546 eŭroj komence de la jaro ĝis 48 756 ĉe la fino.

La afrika oficejo de UEA regule respondas al centoj da informpetoj el ĉiuj partoj de Afriko kaj gvidas korespondajn k.s. kursojn, la Afrika Komisiono verkas kaj distribuas helpilojn por la informa laboro, kaj (ofte dank' al helpo el Eŭropo) aperas Esperanto-periodaĵoj ne nur ĉe la afrika oficejo (*Trafrik'* kaj *Afrika Reto*) kaj la Afrika Komisiono (*Kuko*) sed ankaŭ ĉe pluraj landaj movadoj (precipe en Togolando kaj en Sudafriko). Pluraj afrikaj retaj diskutolistoj donas buntajn informojn al siaj membroj. La Afrika Oficejo havas novan retpaĝon, ĉe <http://www.uea.org/kiu/afriko>.

Instruado en Afriko okazas per koresponde, perrete, kaj surloke en kluboj kaj lernejoj. La lerneja instruado pli kaj pli okazas sub la rubriko "Lernejoj por evoluoj" de la programo Prioritato Afriko. En Benino

elementaj lernejoj de Tozounmé, Kodji, kaj Aguidahoué disponigas Esperanto-kursojn al gelemantoj, same lernejo Orodo en Niĝerio kaj almenaŭ unu lernejo en Kongo Brazavila. Namutema Wabasobe en D.R. Kongolando instruas Esperanton al infanoj en la lernejo CEFJ de la urbo Uvira.

Ekster la kadro de formalaj kursoj, la malagasoj kompilis propran kurson, kiun ili disponigis per koresponde al la gelemantoj; la estraro de la togolanda junularo [OTE] gvidas kurson en la universitato de Lomé kaj la katolika unuigo UTEK instruas al estontaj pastroj de la pastra lernejo de Lomé. Rifuĝejoj en D.R. Kongolando, Burundio, Ruando ktp klopodas diligente lerni kaj uzi la lingvon por proksimiĝi unuj al la aliaj. Ni scias ankaŭ pri kursoj en aliaj landoj (ekzemple Maroko, Niĝerlando, Sudafriko, Komoraj Insuloj, Senegalio). Dume la instrufako de la togolanda landa asocio daŭrigas sian instruagadon: instruado per koresponde per la kurso Ferez, surloke en kluboj per la Zagreba Metodo, perfektiga per la libro *Por la praktikanto*. Ĝi krome organizis siajn kutimajn jaraĵn ekzamenojn. Ĉe nova lernejo nun konstruata en Lomé per financado de esperantistoj oni antaŭvidas ne nur la normalan instruprogramon sed ankaŭ kursojn pri Esperanto kaj pri pactedukado. La stato de la nunaj laboroj videblas ĉe <http://www.esperanto-nederland.nl/togo/bouw.html>.

Havi komunan programon de instruado en Afriko estas granda deziro de la Afrika Komisiono. Tielce ĝi ĵus starigis programon de la nacia nivelo en Afriko. Starigo de programoj de aliaj niveloj sekvas poste. Afriko bezonas instruistojn kaj instruilojn/lernejojn. Naskiĝis la fondaĵo Hans omaĝe al la kammemora Hans ten Hagen. Tiu fondaĵo subvencias instrulaboron, ĉefe trejnkursojn por instruistoj en Afriko. La informa laboro antaŭeniris energie. En Benino okazis radiolensendoj dum pluraj semajnoj pri la internacia lingvo, gvidataj de Hounsounou François kaj Gbadamassi Latifou. En Ganao, dum renkontiĝo de Unesko-kluboj Paul Kwessi Messan kaj Alfred Arthur prezentis la lingvon.

Estraranoj de la junulara sekcio de Unuigo Togolando por Esperanto prezentis la lingvon per elsendoj tra la radiostacioj de Amegran kaj Vogan, kaj membroj organizis prelegojn en liceoj kaj kolegioj. Ĝia vicprezidanto, s-ro Attaglo Elom, prezentis la lingvon al studentoj de la universitato de Lomé, kiuj enskribiĝis por kurso. Krom informado per la matĉoj de la futbalteamo, ankaŭ la 11-a nacia Esperanto-kongreso estis okazo por informi: la radio- kaj televidstacio de la urbo Aneho prezentis la lingvon kaj detale raportis pri la kongreso. Aparte elstara informa agado okazis ankaŭ en Kamerunio, Kanga Respubliko (okaze de la muzika festivalo FESPAM), Niĝerlando (prelegoj en la franca kultura centro kaj en lernejoj, radiolensendoj), Maroko (gazetaraj anoncoj), Sudafriko (novaj informoj de la landa asocio EASA, retejo <http://www.esperanto.za.org>, informado ĉe la internacia kongreso de la Internacia Federacio de Profesoroj de Vivantaj Lingvoj FIPLV).

Kluboj kaj asocioj daŭre laboras aŭ estis starigitaj en Burundio (Klubo Karitato), Zimbabvo (Harare), Kamerunio (Douala), kaj Koldivuaru (kie oni kombinas Esperanton kaj sporton). En Ganao okazis seminario pri gvidado de kluboj. Naciaj kongresoj okazis en Malagasio (aprilo) kaj Togolando (decembro) kaj oni planas sudafrican kongreson por 2004. En Niĝerio la landa asocio estas nun oficiale rekonata. En Tanzanio oni kombinas lernadon kaj uzadon de Esperanto kun komunuma servado pere de ZDF (Zinduka Forumo por Evoluigaj Iniciatoj). Laŭdinda laboro de TEJO-komisiito por Afrika agado, François Hounsounou, kiu ekde sia elekto en julio regule kaj ĝisdatte informadas pri junulara agado en Afriko al la cetera mondo, kaj peras informojn pri monda Esperanto-movado al Afriko.

Novajojn el Afriko oni povas legi sur kvar paĝoj de la revuo *Esperanto*, marto 2004, p. 52-55.

1.6 Kongresoj

Respondeca estrarano pri tiu ĉi fako estis Ivo Osibov. La 88-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Gotenburgo, Svedio, de 26 julio ĝis 2 aŭgusto 2003 kun 1 796 kongresanoj el 63 landoj. En ĝia kadro okazis ankaŭ Internacia Infana Kongresoto, kiun partoprenis infanoj el 8 landoj. La kongreson markis tri novaĵoj. Unue, la solena inaŭguro okazis lundon anstataŭ la kutiman dimanĉon. Due, apud parte kutima dimanĉa programo fluis paralele en tiu tago 15 prelegoj kaj aliaj renkontiĝoj pri la movado, informado, agado, lingvo kaj kulturo, kiuj vekis grandajn interesojn kaj partoprenon de la kongresanoj. Trie, informado al la ekstera publiko antaŭ kaj dum la kongreso estis nekutime abunda laŭ kvanto kaj bunta laŭ enhavo kaj formo. Ĝi ŝuldiĝas al bona preparlaboro de la Brusela Komunikaĉ-Centro, kiu sukcesis kunlaborigi centon da esperantistoj kaj 40 landajn asociojn kaj pere de ili aperigi pli ol 100 artikolojn, kaj radio- kaj televidelsendojn nur ĝis la fino de la kongreso. LKK mem tre efike prizorgis la enlandan informadon kio rezultigis plurajn artikolojn kaj elsendojn en la tutlandaj kaj lokaj informaj medioj de la kongreslando. Tio siaflanke kelkoblis la interesiĝon de la publiko pri la retaj kursoj de Esperanto. La evoluo de la kongreso estis eble sekvu ankaŭ rete. Por la unua fojo oni povis mesaĝi al la kongresanoj pere de iliaj kongresaj retadreso. La kongresa temo, "Lingvaj rajtoj kaj respondecoj," estis pritraktita en pluraj viglaj sesioj multnombro ĉeestataj, kaj kongresa

Ameriko

2003 estis eventoplena jaro por la amerika kontinento. Post migrado el Brazilia al Taguatinga, la oficejo de la UEA-komisiono por Ameriko estis fine translokitita al la urbo São Paulo kaj ekdeĵoris volontulo tie. La komisionanoj sukcese transprenis la torĉon de Atilio Orellana, ilia iniciatinto, kaj firme kaj aktive tenas ĝin. Gvidanto de la komisiono estas Adonis Saliba. La hejmpaĝo de la komisiono estis renovigita kaj ĝi nun troviĝas ĉe <http://www.ameriko.org/>.

La komisiono lanĉis kvar projektojn: NESTO, KORE, Biblioteko kaj Literaturo. El ili NESTO estas furora kaj jam 1000 lernantoj konatiĝis kun la lingvo pere de ĝi. La bulteno de la komisiono, *AktivAmeriko*, aperis 2-foje en la jaro. La komisiono subtenis la ĉeeston de aktivuloj el Ĉilio, Dominika Respubliko kaj Venezuelo en Esperanto-aranĝoj en Svedio kaj Usono.

Landaj kongresoj okazis en Argentino, Brazilo, Kolombio kaj Usono. En Kanado kaj Usono la tradicia laboro de la landaj asocioj bone antaŭeniris, kaj denove okazis someraj kursoj NASK en Brattleboro, Vermonto, Usono. En Meksiko la movado daŭre plifortiĝas sekve de la entuziasmo vekita de la 5-a tutamerika kongreso TAKE, kiu venigis al tiu lando multajn eksterlandanojn kaj stimulis transliman kunlaboron. En Kubo la sperta stirado de Maritza Gutiérrez sukcesas doni al ĉiuj la necesan energion por superveni malfacilaĵojn kaj organizi gravan kontinentan kongreson en printempo 2004. Aparte kuraĝiga estas la granda interesiĝo pri Esperanto inter la junularo.

Ankoraŭ la reĥoj de la Fortaleza Universala Kongreso de 2002 stimulis la agadon en Brazilo, kvankam gravan baton suferis la movado pro la abrupta forpaso de du kolonoj de la tiea movado Symilde kaj Gilbert Ledon. En Peruo oni laboras por revivigi la landan asocion, dum la esperantistoj en Kolombio kaj Venezuelo okazigis komunan kongreson. Aktivis ankaŭ esperantistoj en Argentino kaj Ĉilio, kaj okazis kursoj pri Esperanto en Paragvaĵo.

Arabj landoj

Ĉi-jare la agado koncentriĝis ĉefe en la okcidenta parto de la arablingva mondo. Jen, ekzemple, raporteto pri du el la landoj. Unue, pri Maroko.... La efikoj de anonco aperinta en julio 2002 provizis al ni 46 petojn por lernomaterialo. El tiuj petoj, duono venis el grandaj urboj, la cetero el tre diversaj regionoj, kies foreco malebligis personajn kontaktojn kaj aliron al eventuala kurso. Post sesmonataj kontaktoj kun marokaj lernantoj, oni decidis starigi preskaŭ senpagan kurson en Kazablanko en julio. Tiun kurson multe malfaciligis la malfermo de la loĝantoj ĝenerale, kiuj tre timas reprezaliĝojn post la majaj atencoj, kiuj mortigis dekojn da homoj en diversaj lokoj de Kazablanko. Tamen, dum semajna restado en Maroko de membro de la Araba Komisiono, okazis pluraj renkontoj kun lernantoj. Se ili ne volas mem organizi ion ajn pro riskoj (ĉu realaj ĉu supozitaj), ili tute pretas partopreni staĝon, daŭrajn kursojn kaj gvidadon interrete el Eŭropo.

En nia dua ekzempla lando, Algerio, Esperanto estas konata nur dank' al franclingvaj interretaj kursoj. Evidentiĝis, ke, same kiel en Maroko, lernas lerni nur supraj per la interreto. Ĝenerale la homoj preferas lerni hejme perpapere kaj sendi la taskojn rete au poŝte. Tial la Araba Komisiono sendis fotokopiojn de la kurso por ke ili ne perdu la intereson survoje. Tio estas malmultekosta solvo se oni konsideras ke multaj kabiloj/berberoj ne volas lerni arablingve.

En aliaj partoj de la regiono, unuopaj esperantistoj daŭrigas sian agadon.

Azio

Pli ol 80 personoj ĉeestis la kunsidon organizitan de la Azia Komisiono de UEA dum la Universala Kongreso en Gotenburgo. La organo de la Komisiono, *Esperanto en Azio*, laŭregule eldoniĝis trifoje kaj estis ekspedita al ĉ. 500 legantoj. Projekto C, kiu celas aligi aziajn aktivulojn al UEA, sukcesis: 92 homoj aliĝis al UEA. Laŭ Projekto C, ĉ. 200 libroj estis senditaj al irana universitato je la jarfino, donacitaj de Japana Esperanto-Instituto kaj Libroteko Tokio. La laboron de la Komisiono subtenas ĉefe mondonacoj, plejparte el Japanio.

Laŭ raportoj de la Azia Komisiono, la Esperanto-movado estis aktiva en Azio, profitante la okazigon de la Universala Kongreso en Pekino en 2004. En Ĉinio oni aktive agadas por sukcesigi la Kongreson. En la kvina Ĉina Kongreso de Esperanto, okazinta en oktobro en Ĵilin-provincio, partoprenis 236 homoj. Diversloke oni vigle agadas sub la devizo "Per la UK por la Ĉina Esperanto-movado".

En Japanio regas similaj aspiroj – ĉi-foje pro tio, ke Jokohamo estas kandidato por la UK en 2007 kaj pro la 100-jara jubileo de japana Esperanto-movado en 2006. Dume, en Koreio daŭras vigla movado, kies 35-a landa kongreso okazis en 2003. La mongola movado estas en tumulto: nova Mongola Esperanto-Societo fondiĝis ekster la kadro de la Mongola Esperanto-Asocio. Vicprezidanto de UEA Lee Chong-Yeong sekvas la situacion kaj jam ĝi komencas renormaliĝi. La dua Azia Kongreso de Esperanto stimulis agadon de la Vjetnama Esperanto-Asocio. En Vjetnamio oni eldonis du vortarojn kaj planas eldoni plian.

Okazigote la 5-an Himalajan Internacian Renkontiĝon en 2004 kaj la 4-an Azian Kongreson de Esperanto en 2005, en Nepalo oni aktive laboras per kursoj kaj eldonado. Dume, en Pakistano la movado restas vigla, kaj en Barato en la suda parto de la lando oni okazigas Esperanto-kursojn amase vizitatajn.

Sajne okazas nova eksplodo de interesiĝo pri Esperanto en Irano, interalie dank' al eldonado de la organo *Irana Esperantisto*, kiu estas aĉetebela en surstrataj buĉoj. Post la sukcesaj Esperanto-kursoj en 2002 subtenataj de Irana Esperanto-Asocio, la 18-an de majo 2003 fondiĝis AFESPO (Afgana Esperantista Klubo) kaj multaj homoj vice atendas por ĉeesti ĉe sekvantaj Esperanto-kursoj. Sed malkas lernomaterialoj kaj lokoj por kunveni. UEA helpas laŭeble. Dume, en Taĝikio okazis la 3-a landa kongreso en oktobro.

En Filipinoj kaj Indonezio troviĝas kelkaj esperantistoj, sed la agado estas esence loka; pli videbla agado okazas en Singapuro.

Eŭropo

En la landoj de la Eŭropa Unio, Eŭropa Esperanto-Unio daŭrigis sian tradician agadon, sed la kontaktoj inter la landaj asocioj kaj la centra estraro multe kreskis. Estis kunlaboro por realigi la jam menciitan (sub Informado) serion de grandaj kutpaĝaj anoncoj en pluraj ĵurnaloj. Al tio aldoniĝas la informo agado de la Brusela Komunikaĉ-Centro, kiu kampanjis kontraŭ diskriminaciaĵ dungo-anoncoj, kiuj postulas la anglan kiel gepatran lingvon. Serio de tre utilaj kontaktoj kun EU-parlamentanoj estis realigitaj kaj pluraj parlamentaj demandoj estis metitaj kaj en la eŭropa kaj en la naciaj parlamentoj. La plivastigo de la Eŭropa Unio en la nuna periodo prezentos novajn definojn por la regiona agado.

En sudorienta Eŭropo la Esperanto-agadon daŭre malfaciligas la malbona ekonomia stato, dispartigo de la ŝtatoj kaj interretaj malamoj.

Kvankam pluraj lokaj organizaĵoj kaj unuopuloj plu aktivis kaj kelkaj internaciaj aranĝoj okazas, la agado de kelkaj el la landaj asocioj apenaŭ senteblas kaj ĝenerale mankas emo al komuna agadprogramo en la regiono. Sed rimarkindas la laboro de la albanaj esperantistoj kaj de la makedonaj, bosnaj kaj rumanaĵ, kvankam en multaj lokoj tiu agado okazas ekster la kadro de la landaj asocioj. En Bulgario daŭras klopodoj reorganizi la asocion.

La Balkana Komisiono de UEA, kunlabore kun TEJO, precipe kun ĝia faka sekcio Esperanto ĉe Interreto (E@I), strebis al pliakiviĝo, kunordigata laboro kaj kreado de novaj esperantistoj. La rezultoj precipe senteblas inter la junaj esperantistoj en Turkio kaj Bosnio kaj Hercegovino, sed estas necesaj novaj impulsoj por daŭrigi tiun tendencon.

En Centra Eŭropo plulaboras la Mezeŭropa Komisiono de UEA, kies septembra kunsido en Gliwice, Pollando, estis markita per la transdono de ĝia stirado de Oszkár Princz, Hungario, al Stanisław Mandrak, Pollando.

Ene de TEJO-kadro, el iamaj OKE (okcident-Eŭropa) kaj MEJK (mez-Eŭropa), formiĝis TEJK (Tut-Eŭropa Junulara Konferenco), kiu helpas kunordigitan agadon, kunlaboron kaj interŝanĝon de spertoj inter junuloj en la "malnova" kontinento. TEJO-komisiito pri Eŭropa agado estas Anna-Laura Wickström.

El inter la landaj asocioj aparte menciendas la franca por informa agado vere altnivela kaj modela, fakte diversmaniere imitata de aliaj landaj asocioj. Antaŭ Italio trovis novan viglon sub la prezidanteco de Aldo Grassini, kaj dediĉas sin aparte al kreskigo de la prestiĝo de Esperanto inter la "laika" mondo, per kunvenoj kaj kongresoj enhave kiel eble plej malfermaj. Okazis ankaŭ modela informo laboro en Svedio, precipe perreta (la svedoj aparte efike ekspluatis por la informa laboro la lastatempan Universalan Kongreson, kiel oni povas legi aliloke en tiu ĉi raportoj).

En Hungario Esperanto estas regule instruata kiel elektelebla studobjekto en la universitato. La kroataj esperantistoj travivis historian jaron por akiro de nova sidejo, dum jam rutinas la sukcesaj kunlaboroj kun la kulturaj instancoj enlandaj. En la baltaj landoj stimulas la agadon la preparlaboro por la Universala Kongreso en Litovio en 2005.

Daŭras la klopodoj unuigi la kelkajn aŭstriaĵn asociojn, kaj en oktobro elektigis nova estraro, kiu konkrete agas por ke la aŭstra movado denove aperu inter niaj plej aktivaj landaj asocioj. Rusio vivas alternajn momentojn pro la enlanda socia situacio. Elstaras ĉiam la aranĝoj en Ĉeboksarj, nova kerno de Esperantujo. Ukrainio ricevis novan impulson post sperto en Gotenburgo. En Armenio oni sukcesis finpretigi la manuskripton de nova vortaro, eldonota dank' al subvencio Cigno, asignita en 2003.

Oceanio

La Oceania Komisiono de UEA nun konsistas el Bradley MacDonald, kunordiganto, Matthew Maguire kaj Jonathan Moylan, reprezentanto de la Aŭstralia Asocio, dum Bradley MacDonald kaj Brian Fox reprezentas Nov-Zelandon. La Komisiono okupiĝis pri tradukado de la kurso de Carlos Pereira en la indonezian kaj diligente estis metitaj kaj en la eŭropa kaj en la naciaj parlamentoj. La plivastigo de la Eŭropa Unio en la nuna periodo prezentos novajn definojn por la regiona agado.

1.9 Esploro kaj dokumentado

La Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED), la esplora fako de UEA, daŭrigis sian agadon sub forta kaj bone informita estraro, kiu konsistis el profesoro pri slavistiko Jouko Lindstedt (Universitato de Helsinki), docento pri interlingvistiko kaj la hungara lingvo Iona Koutny (Universitato de Poznań), docento pri interlingvistiko Detlev Blanke (Universitato Humboldt Berlin), vicprofesoro pri edukado Mark Fettes (Universitato Simon Fraser, Vankuvero), kaj la direktoro de CED, Humphrey Tonkin, universitata profesoro pri humanistiko (Universitato de Hartford, Usono). Tonkin estis la respondeca estrarano de UEA. Sur la kampo informado, d-ro Blanke redaktis la regule aperintan *Informilo por Interlingvistoj*, kiu celas teni ĝisdataj la sciojn de interlingvistoj pri novaj eldonaĵoj, konferencoj, ktp. D-ro Tonkin kunlaboras kun d-ro Blanke en kompilado de la ĉiujara *Internacia Bibliografio de la Asocio pri Modernaj Lingvoj* (Usono), kiu por la jaro 2002 (registrata en 2003) denove enhavis pli ol tricent bibliografiajn erojn pri Esperanto kaj interlingvistiko. Tiu ĉi estas nepe la plej kompleta alirebla bibliografio pri interlingvistiko kaj esperantologio (kvankam ekokazas en niaj rondoj ankaŭ aliaj interesaj bibliografiaj iniciatoj).

Pri la instruado de kaj pri Esperanto en universitatoj, vidu la ĉapitron Instruado. Ĉi-somere, la universitato de Amsterdamo, Nederlando, sendos du studentojn pri lingvistiko

al la Universala Kongreso en

Pekino por plenumo de surloka esplortasko rilate la intonacian fenomenon en Esperanto. La studenta duopo venkis konkurson, kies premio estas staĝovojaĝo al la UK. La Amsterdama universitato jam antaŭ unu jaro agnoskis la Universalajn Kongresojn kiel formalan staĝejon. Per sia esplorraporto la studentoj akiris

kreditpontojn konforme al la normalaj universitataj reguloj. Ĉe la Universitato Adam Mickiewicz, en Poznań, Pollando, daŭre okazas interlingvistikaj studoj sub la gvido de Iona Koutny, kun kunlaboro de CED kaj de Esperant Studies Foundation. En Usono, la Nordamerikaj Someraj Kursoj (NASK) denove okazis ĉe School for International Training (SIT), universitatnivela institucio en Brattleboro, Vermonto.

La revuo *LPLP (Language Problems and Language Planning – Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado)* aperis, kiel kutime, trifoje en la jaro, en eldono de Benjamins, Amsterdamo, kaj sub redakto de Humphrey Tonkin kaj Probal Dasgupto, kun kunlaboro de Mark Fettes (interlingvistika redaktoro, kaj Frank Nuessel kaj Renato Corsetti (recenzaj redaktoroj). Al la redakcia komitato, kiu konsistas el eminentaj fakuloj el la tuta mondo, aldoniĝis Sabine Fiedler (Germanio) kaj Liu Haitao (Ĉinio). Aperis la unua volumo en nova serio de okazaj volumoj, *Studies in World Language Problems (Studoj pri mondaj lingvo-problemoj)*, same eldonataj de CED en kunlaboro kun la eldonejo Benjamins. Tiu ĉi libro, en la angla lingvo kaj redaktita de Humphrey Tonkin kaj Timothy Reagan, celas jeti rigardon al la nuna lingva situacio tutmonda kaj konsideri la estontecon, sub la titolo *Language in the 21st Century* (La lingvo en la 21-a jarcento). En preparo ĉe UEA estis kaj ĵus aperis ankaŭ libro de Robert Phillipson, en esperantlingva traduko de István Ertl, pri la minacanta rolo de la angla lingvo en la Eŭropa Unio.

CED organizis en julio seminarion ĉe la Kopenhaga Komerca Fakultato pri la eŭropa lingvo-problemo, laŭ invito de tiu sama prof. Phillipson. Dudeko da invititaj fakuloj pasigis plenan tagon en diskutado



Studentoj en la la Universitato de Adam Mickiewicz en Poznań, Pollando

de la eŭropa situacio kaj la ebloj, kiujn ĝi prezentas por Esperanto kaj aliaj alternativaj solvoj. La Akademio de Esperanto kaj la Sveda Akademio gastigis simpozion en la Gotenburga Universitato tuj post la tiea Universala Kongreso, en kiu partoprenis pluraj aktivuloj de CED. Organizis ĝin prof. Christer Kiselman. Aparte kontentigaj al CED estas la signoj de nova spirito en la Akademio – kaj la notindaj atingoj ankaŭ de la Akademio Internacia de Scienco Sammarino, sub la lerta gvido de prof. Helmar Frank. Plurilate la perspektivoj por serioza pritrakto de Esperanto kaj internaciaj lingvaj problemoj pliboniĝas. Pri reviviĝo de la terminologia laboro, vidu la ĉapitron Faka Agado.

En la Gotenburga kongreso, okazis kiel kutime Esperantologia Konferenco organizita de CED, ĉi-foje pri *Esploraj pri esperantologio: Kien iri, kaj per kiuj vojoj?* Raporto aperis en la septembra numero de la revuo *Esperanto*, p. 173.

2. La organiza bazo

2.1 La decida organo: la Komitato

La nombro de la komitatanoj kreskis al 76 per elekto de unu komitatano C en Gotenburgo. La Komitato kun granda bedaŭro notis la tragikan forpason de unu el siaj plej fidelaj kaj aktivaj kolegoj, Symilde Ledon, Ĉefdelegito en Brazilo. Pli ol 90% de la komitatanoj havas aliron al la reto, kio ebligas facilan kaj rektan komunikadon de la komitatanoj inter si, kun la organoj de la Asocio kaj kun la Centra Oficejo. Kvankam dum la raportata jaro minimume 50 komitatanoj sendis minimume 360 retajn mesaĝojn per la retlisto de la komitato, oni povas konstati ke ne ĉiuj mesaĝoj rilatis rekte al la laboro de la Asocio kaj ĝiaj organoj. La reto donas la eblon tuj prezenti laboron, problemojn, proponojn, kritikon ktp, sed ne estis sufiĉe eluzata tiucele. La komitato kunsidis dum la 88-a Universala Kongreso dufoje dum entute ok horoj. La kunsidojn partoprenis 51 komitatanoj kaj 5 anstataŭantoj. Bedaŭrinde (kaj iom konsternite) ne sendis siajn komitatanojn nek iliajn anstataŭantojn 5 landaj asocioj kaj 2 fakaj asocioj. Partoprenis la komitatankunsidojn ankaŭ 4 observantoj.

Dum la jaro daŭris la eksperimento labori per ok subkomitatoj, kiuj povis funkcii dum la tuta jaro – kaj ili faris tion, iuj pli, iuj malpli (inter la plej viglaj estis Subkomitato 8 – Junularo). La subkomitatoj kunsidis ankaŭ dum la kongreso en Gotenburgo, pridiskutante la temojn de la tagordo kiujn asigis al ili la komitato kaj preparante proponojn por la komitataj decidoj. La sperto kun la laboro de la subkomitatoj montras ke tia formo de laboro povus transformiĝi el eksperimento al normo, precipe kiam granda plimulto de la komitatanoj kaj ĉiam pli multaj ceteraj membroj havas aliron al la reto. Per la reto eblus pliintensigi la funkcianton de la komitato dum la tuta jaro, precipe pere de la subkomitatoj.

2.2 Rilatoj kun TEJO

La jaro 2003 estis perturba jaro por Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Dum printempo demisiis kvin el naŭ estraranoj pro malkontento pri kunlaboro kun la UEA-estraro kaj la Centra Oficejo. Pluraj raportoj al unu el la plej grandaj ekstermovadaj subtenantoj malfrujs pli ol unu jaron, la aperitimo de *TEJO-tutmonde*, oficiala informorgano de TEJO, malreguliĝis, kaj,

kombinite kun aliaj okazaĵoj en UEA kaj la CO oni povis havi impreson de ĝenerala krizo. Bonŝance, dum tiu sama jaro la evoluo ankaŭ sukcesis reakiri pli pozitivan direkton. Tagnokta laboro de paro de restintaj TEJO-estraranoj rezultigis finfaron de mankintaj raportoj kaj oni devis repagi neniuon el la subvencioj al la minacanta fondo; dum viglaj kunsidoj ĉe la Internacia Junulara Kongreso, la TEJO-komitato elektis novan estraron kaj decidis pri konkretaj agadirektoj; nomumo de komisiitoj por kontinentaj agadoj en Afriko, Ameriko kaj Eŭropo ebligis pli malcentritan kunordigadon de la landaj sekcioj. La novelektita TEJO-prezidanto Bertrand Hugon transprenis la taskon kune kun nuraj kaj iamaj aktivuloj de TEJO redifini la strategion de la organizaĵo, kaj pluraj unuopaj komitatanoj akceptis ĝis la venontjara kunsido sekvi kaj raportoj al la komitato la evoluon de plej prioritataj ŝanĝoj en la organizaĵo. Jam tiuj novaj iniciatoj komencis alporti fruktojn.

Do, ŝajnas ke la momentaj krizsimptomoj en la junulara movado estas, almenaŭ por nun, forigitaj, kaj restas esperi kaj labori ke ĝis la someraj kunsidoj de ambaŭ komitatoj (tiu de UEA kaj tiu de TEJO), la du estraroj trovos solvon por kernaj problemoj ligitaj al la junulara agado kaj difinitaj fare de la komitatoj en Svedio, 2003. Tio inkluzivas (de la flanko de TEJO) la demandon pri propra jura personeco de TEJO, kaj pli adekvatan strukturatan subtenon flanke de la CO, en maniero kiu ebligis pli harmonian kaj konstantan evoluon de la junulara agado, kaj espereble malebligis ripetigon de la streĉiteco de la unua duono de 2003.

Ni raportas ĉi tie nur pri plej elstaraj agadoj sur kampo tre bunta kaj aktiva. La agadon de la junulara sekcio de UEA, Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, subtenas parte la kotizoj, kiujn TEJO-membroj pagas al UEA, parte subvencioj, kiujn TEJO (modele) sukcesas akiri ĉe la instancoj de Konsilio de Eŭropo, Eŭropa Unio, kaj parte subvencioj de fondoĵoj (precipe Esperant Studies Foundation, ESP). Dank' al tiuj subvencioj, TEJO subtenas i.a. ankaŭ partoprenon de aktivuloj el nepagipovaj landoj en ĝiaj trejn-aranĝoj. TEJO havas sian reprezentanton ĉe la estraro de UEA (Marko Naoki Lins en la komenco de la periodo, Sonja Petrović en la fino), kaj daŭre okazas bona kunlaboro inter TEJO kaj UEA, eĉ se foje kun intergeneraciaj streĉitecoj (aparte akutaj, kiel ni jam notis, en la fruaj monatoj de 2003). Ambaŭ kunsidoj de la estraro de TEJO en 2003 okazis en la sidejo de TEJO kaj UEA en Roterdamo – en junio kaj septembro. Same kiel ĉe UEA, la limo inter la

agado de TEJO mem kaj de la junulara movado ĝenerale estas malfacile difinebla. Amaso da agado – renkontigoj, eldonaĵoj, lingvolernado, informado – evoluas ekster la kadro de TEJO, sed ofte dank' al la inspiro aŭ la praktika trejnad, kiun TEJO liveras. Ni mencias ĉi tie agadon klare ligitan al TEJO mem.

Okazis en 2003 tuta serio da seminarioj, konferencoj kaj aliaj aranĝoj. La tradicia Internacia Seminario de la germana junularo okazis jarkomence (27 decembro 2002 – 3 januaro 2003), ĉi-foje en Trier, kun temo “Ekstremismo – tipoj, originoj, efikoj.” Partoprenantoj diskutis diversajn formojn de ekstremismo politika, religia kaj sporta.

En la Internacia Junulara Festivalo en Savona, Italio (16-22 aprilo), la partoprenantoj havis okazon diskuti la temon “Tutmondismo, lokismo, kaj junulara idento.”

De la 20-a ĝis la 27-a de aprilo ĉe universitato MIT en Bostono, Usono, TEJO kunorganizis kvinan en la vico de seminarioj Esperanto@Interreto, koncentritan al perreta lernado. Dank' al loka Esperanto-klubo la seminarianoj povis uzi klasĉambrojn de la fama universitato kaj prezenti Esperanton al ĝiaj studentoj.

TEJO organizis internacian Esperanto-kurson kunlige kun la 59-a Internacia Junulara Kongreso en Lesjöfors, Svedio, de 19 ĝis 26 julio, en

kiu partoprenis trideko da komencantoj. La sperto estis tre pozitiva, kaj espereble tia kurso iĝos tradicia parto de ĉiuj pli grandaj Esperanto-aranĝoj. La samtempan IJK-on, organizitan unuafoje de internacia teamo, partoprenis 220 homoj el pli ol 50 landoj. Raporton oni povas legi en la septembra numero de la revuo *Esperanto* (p. 185).

Trejnkurso pri “Interkultura lernado” okazis kadre de la ILEI-konferenco en Örestrand, Svedio, de 4 ĝis 9 aŭgusto, kun la celo pretigi kunlaborantojn por la projekto “Interkultura” (vidu sube). La programo konsistis el prelegoj, interagaj aktivecoj kaj ekzercoj pri teoriaj kaj praktikaj aspektoj de interkultura agado. Samtempe, en Győr, Hungario, de 4 ĝis 10 aŭgusto, esperantistaj gejunuloj kunvenis por Internacia Junulara Semajno sub la temo “La mondo estas teatro.”

En 2001, la Eŭropa Jaro de Lingvoj, TEJO donis grandan impulson al la lingvofestivala movado, fondita kelkajn jarojn pli frue de usona esperantisto Dennis Keefe en Tours (Francio). Tiuj lingvofestivaloj nun farigis ofta fenomeno: en la jaroj 2002-2003, ekzemple, okazis festivaloj en Toulouse (Francio), Ĉeboksary, Ivanovo kaj Volgograd (Rusio), Jalta (Ukrainio) kaj Västerås (Svedio). De 11 ĝis 14 majo en Parizo okazis Konferenco de Esperanto-junularo el Centra kaj Okcidenta Eŭropo por pridiskuti la agadon de la eŭropaj TEJO-sekcioj, taksu la sukcesojn kaj malsukcesojn de la pasinta jaro, kaj plani la strategion por kunlaboro en la jaro 2003-2004. Inter la rezultoj, kiel jam menciite, estis decido starigi apartan strukturon, TEJK, por la estonta kunlaboro.

Se temas pri eldonaĵoj, la revuo *Kontakto* aperis sesfoje, en numeroj kun ĉeftemaj jazo, La Silka Vojo, Vojaĝado, Afriko, Handikapoj kaj Akvo. Ankaŭ la interna bulteno *TEJO-Tutmonde* bone ludis sian rolon kiel ligilo kaj informilo por TEJO-membroj, malgraŭ neantaŭviditaj malfruoj. Komence de 2004 la bulteno ekhavis novan redaktoron, nome la TEJO-volontulon Joel Amis, kaj dum la sekva jaro estos redaktata en la CO. *TEJO-aktuale*, la senpaga informilo de TEJO, aperis semajne kaj liveris aktualajn informojn pri TEJO-agado kaj agado de aliaj junularaj organizaĵoj al siaj 400 abonantoj.

Jam 25 jarojn la Pasporta Servo de TEJO aperigas jaran liston de homoj pretaj gastigi membrojn dum vojaĝado – senpaga maniero ekkoni la lokajn kulturojn, familian vivon kaj kutimojn en diversaj mondopoj. La eldono de 2003 enhavas 1286 adresojn de TEJO-membroj en 80 landoj.

Sur la kampo de interreto kaj modernaj komunikiteknologioj, TEJO tre bone montras sian junecon kaj progresemon. Dum 2003 al ĝi, kiel faka sekcio, aliĝis internacia laborgrupo Esperanto@Interreto, kunordiganta projektojn kiel *lemu!* (20-lingva kursejo kaj informejo pri Esperanto, kun jam pli ol 6 000 registritaj uzantoj el pli ol 50 landoj), RIC (Reta Informado-Centro kun konsilioj pri informado pri Esperanto kaj alŝuteblo/elŝuteblo de diverslingva informmaterialo) kaj Lingva Prismo (paĝaro kaj por lingvoj, kiu al vasta celgrupo en alloga maniero enkondukas demandojn pri lingva riĉeco, interlingvismo kaj Esperanto). Krome, la rethelmo de TEJO mem, <http://www.tejo.org>, tradukita en 25 lingvojn, ricevis “Premion pri multlingva lernado” de sveda organizaĵo Tema Modersmål. Novaj projektoj pri kiuj TEJO kaj E@I laboras, estas starigo de Reta Oficejo (espereble ne bezonata, se modernigo de la Centra Oficejo okazos laŭ la plano) kaj Artista Datumbazo en kiu, por komenco, eblas facile trovi ĉiujn necesajn informojn pri esperantistaj muzikistoj.

Pri la reta projekto *Interkultura* (www.interkultura.net) ni jam aludis. La ĉefa celo de tiu ĉi retpaĝaro estas antaŭenigi interkulturajn dialogojn kaj kunlaboron, stimuli pensadon kiel superi interkulturajn konfliktojn kaj instrui toleron kaj senton de solidaro. *Interkultura* liveras vastan

gamon de teoriaj kaj metodikaj materialoj, kaj praktikajn ekzercojn por aktivuloj. Ekde septembro 2004, la retpaĝaro espereble estos multlingva kaj ankaŭ funkcios kiel kurvenejo por la kunagantoj en la projekto, kie oni povas pridiskuti la plej tiklajn demandojn kaj partopreni komunajn perretajn aktivajn.

TEJO ankaŭ havas plurajn retajn diskutajn grupojn, aldone al tiuj por la komitato (komitato@tejo.org), estraro (estraro@tejo.org) kaj membroj (membroj@tejo.org). Plej aktivaj en 2003 estis la grupoj tejo-ker (pri eksteraj rilatoj), tejo-informado, tejo-ecxei (pri utiligo de la reto en la Esperanto-agado), kaj tejo-monpetado.

2.3 Revuo

Post la reaktivado en 2002 nia ĉefa informilo, revuo *Esperanto*, P konservis normalan aperitiron ankaŭ en 2003, sub redakto de Stano Marček. Eĉ pli rapide ĝi atingadis retajn abonantojn, kiuj mendis la elektronikan version kadre de pasintjare okazinta eksperimento pri reta abonado. Rete aboni rajtis la membro-abonantoj aldone al la ricevado de la papera revuo. La eblecon uzis entute ĉ. 50 UEA-membroj, kio permesis kolekti necesajn spertojn por pluevoluigo de la retaj servoj de UEA en la sekva jaro. La revuo daŭre prezentas sperrigardon de la laboro de UEA kaj de la Esperanto-movado ĝenerale, kaj ĝi rolas kiel diskutejo, informejo, kaj ankaŭ recenzejo de novaj libroj. La decido trovi redaktoron ekster la Centra Oficejo, anstataŭe utiligi la servojn de dungito en la Roterdama sidejo, montrigis ĝenerale sukcese, parte pro la personeco de s-ro Marček, kiu ĉiam pretas esplori novajn vojojn kaj novajn manierojn liveri la revuon al la legantoj, sed parte ankaŭ pro la moderna teknologio, kiu ebligas tian deforan agadon. Oni ja perdas ion pro tio, ke la redaktoro ne sidas inter la oficistoj, sed la gajnoj (interalie financaj) ŝajne superas la perdojn.

2.4 Administrado

Estrarano pri financo kaj administrado estis Ans Bakker-ten Hagen. La plej granda, sed samtempe perturba novaĵo de la fino de la jaro estis decido de la nuna Ĝenerala Direktoro Trevor Steele ekigi el sia posteno en aprilo 2004. S-ro Steele estis nomita de la estraro por okupi tiun postenon dum periodo de konsiderinda streĉiteco en la Asocio. Kiel homo, kiu komence ne bone konis la internan funkciadon de la Asocio, li entuziasme laboris por restarigi fidon kaj konfidon inter la oficistoj kaj kun la ekstera publiko, tiel ke nun, malgraŭ la diversaj administraj paneoj, kiuj ŝajne afliktas nin, li povas transdoni al sia posteulo iom pli trunkvilan organizaĵon ol tiu, kiun li heredis. La Estraro estas tre dank' al li. Fine de la jaro Osmo Buller, la antaŭa Ĝenerala Direktoro, estis nomita de la Estraro por ree okupi la postenon. Li ekoficos denove en aprilo 2004.


Komence de 2003 laboris en la CO sekvaj kolegoj: Trevor Steele (ĝenerala direktoro), Ionel Onet (libroservo), Roy McCoy (grafikisto), Marvin Stanley (kasisto), Atie van Zeist (sekretario), Nikola Rašić (konstanta kongresa sekretario), Clay Magalhães (kongresa administrado), kaj Joost Witteveen (komputilisto). La redaktoro de la revuo *Esperanto*, Stano Marček, loĝas en Martin, Slovakio. Frue en la jaro aldoniĝis Ziko Marcus Sikosek, kiu komencis la grandegan laboron

ordigi Bibliotekon Hector Hodler laŭ kontrakto financita de Esperantic Studies Foundation, kaj "Linda" Maria de Fatima Borges Monteiro, nia ĉiam bonhumora purigistino. Valoran helpon donis volontuloj: Rob Moerbeek, kiu ankaŭ provlegis la revuon; Alfons Pijnacker, kiu helpis registri kongresajn mendojn; Ina van der Krans, kiu venis dufoje transpene por helpi en la financa fako sed foriris frue en la jaro; Simo Milojević,

kiu tre emfaze dum la preparado por la Universala Kongreso kaj la sekva inventarado tre bone kontribuis al la funkciado de la libroservo; kaj Katja Bodnárová, kiu laboris volontule dum kelkaj periodoj en la sekretariejo. TEJO-volontulo dum la tuta jaro estis la usonano Charles Smith. En majo Nikola Rašić demisiis, kaj Clay Magalhães transprenis la rolon de Konstanta Kongresa Sekretario. Stanka Starčević estis

dungita por labori plentempe en la financa fako. Fine de 2003 estis evidente, ke Joost Witteveen ne oficos en 2004, kaj nun necesas trovi homon, kiu scias prizorgi la komputilan sistemon. Fine de la raportita jaro do deĵoris 9 ofiĉistoj.

Pro la fluo de la monda kaj nederlanda politiko fariĝas ĉiam pli malfacile dungi – aŭ eĉ inviti homon, kiu ne estas civitano de Eŭlando. Aliflanke, la pligrandiĝo de EU sendube plifaciligis akiron de laborfortoj. Dum la lasta kvarono de 2002 kaj la tuta 2003 ĉiu ofiĉisto plenigis semajne folion, kiu registris la laborhorojn dediĉitajn al la diversaj areoj en la staba buĝeto. La procentaĵo de la areoj aperas en la grafikaĵo. Neatendite granda estas la sekcio "diversaj ceteraj", sed post analizo oni konstatas, ke multaj laboroj (ekzemple intervjuoj ĉe la direktoro, aŭ pagado de fakturoj ĉe la kasisto) ne rekte rilatas al specifa buĝeta areo. Celo de tiu grafikaĵo estas indiki al la asocio, al kiaj taskoj kaj kiomgrade ĝiaj ofiĉistoj dediĉas sian tempon.



Spezokonto (en eŭroj)

KOSTOJ

Rezulto	Buĝeto	Rezulto
2002	2003	2003
265354	211000	*1243393
46403	34000	41136
5631	5400	6690
317	700	376
0	0	0
12371	13000	11055
330076	264100	302652
10353	11500	10544
2038	3500	2651
1464	3000	1815
6127	3500	3291
1423	3250	1033
850	300	1459
1145	300	1145
2292	2500	1578
-622	-1000	-1007
25071	27250	22216
6430	6000	7231
391	350	327
4149	2750	3445
1752	3000	1028
3195	3100	3294
1579	1700	1700
-2180	-1050	-2495
15315	15850	14530
34458	26000	20708
13467	12000	11407
31766	29500	28817
-2142	-3000	-1180
69077	64500	59752

8626	Preskostoj Jarlibro	5000	5973
9232	Dissendo/kovertoj	8000	7903
0	Grafiko	2000	3040
-3493	Anoncoj	-5000	-2798
14365	Jarlibro, nete	10000	14118
5059	Preskostoj Kontakto	5400	4610
5109	Dissendo/kovertoj	3200	3425
2483	Grafiko	2600	2219
2700	Redakto	2700	2843
-83	Anoncoj	-100	-0
15269	Kontakto, nete	13800	13096
11793	Estraro (vojaĝado)	10000	8896
4311	Estraro (korespondado)	1500	1384
8976	Ofiĉistoj (vojaĝado)	2000	1250
3618	Vojaĝado (UK)	2000	1669
28698	Vojaĝoj/korespondado	15500	13199
1505	Edukado	6000	4370
22731	Informado	20800	*23909
1881	Eksteraj rilatoj	4000	1596
142	Komisitatoj, vojaĝoj/korespondado	8900	5674
26259	Movada evoluigo	39700	35549
1749	Bankokostoj	2500	1643
-40	Kurzdiferencoj	0	876
2306	Reprezentado	2300	2295
3321	Antaŭaj jaroj	0	6412
0	Diversaj kostoj	200	861
7335	Ĝeneralaĵ kostoj	5000	12086
0	Amortizo, domo	0	0
1200	Amortizo, aparatoj/mebloj	1000	1072
5626	Amortizo, komputiloj	4500	4727
2243	Amortizo, programaro	1350	1732
9069	Amortizo, entute	6850	7531
549007	Sumo de la kostoj	462550	494730

RIMEDOJ

2728	Membroj Gvidlibro	2850	2379
17982	Membroj Jarlibro	21000	19109
480	Dumvivaj Membroj kun Jarlibro	500	640
101952	Membroj-Abonantoj	119000	105411
47450	Dumvivaj Membroj	48000	46850
3347	Membroj Jarlibro (junaj)	4800	3406
2808	Membroj-Abonantoj (junaj)	5500	3689
176747	Kotizoj de individuaj membroj	201650	*181483
8002	Aligitaj membroj	8500	7797
929	Aligitaj membroj junaj	1200	1014
3853	Abonoj Esperanto	3750	3288
627	Kolektivaj abonoj Esperanto	600	510
4800	Abonoj Kontakto	6000	4677
1635	Kolektivaj abonoj Kontakto	1700	764
14858	Societo Zamenhof	17500	12265
2950	Fakaj Organizoj	2950	3050
-1582	pago al TEJO	-2350	-1727
212819	Kotizoj	241500	213121
149026	Vendoj de la Libroservo	130000	119986
-99877	Kosto de varoj venditaj	-86500	-76662
49150	Libroservo, malnete	43500	43325
-1154	Merkatado	-1000	-1220
-1800	Katalogokostoj	-1800	-1800
-1472	al stokrezervo	-1250	-1635
1974	Abonfako	2600	1343

46698	Libroservo, nete	42050	40013
23931	Vendoj de Eldona Fako	14500	17702
-18031	Aldonoj (novaj libroj)	-4500	-9691
1682	Ŝanĝo stokvalora	-5500	2095
-1538	al stokrezervo	-1450	-1377
-1593	Tantiemoj & stokado	-900	-1673
4451	Eldona Fako, nete	2150	2866
8789	Grafikaj servoj CO	11000	2400
1731	Aliaj servoj CO	4800	19926
4000	Programado	1000	0
700	Instituto Hodler	700	700
10000	Kompenso Propaganda Konto	10000	10000
62646	20%-a ĝustigo: laŭ kalkulo	62600	50406
-25100	20%-a ĝustigo: al rezervo	-21250	-33000
112865	Servoj kaj Kompensoj	68850	50431
31057	Kotizoprocentaĵo UK	40000	70361
10000	Rezervo	1000	1000
0	Turismo	1000	0
71866	Rento, nete	62500	63609
1816	Donacoj al la Ĝenerala Kaso	3000	2675
241	Aliaj enspezoj	500	1201
114980	Diversaj enspezoj entute	108000	138846
491813	Sumo de la rimedoj	462550	445277
57194	Saldo	0	49453
549007	Sumo de la kostoj	462550	494730

Bilanco

de Universala Esperanto-Asocio je la 31-a de decembro 2003 (por komparo aperas ankaŭ la stato fine de 2002)

AKTIVOJ

	2002	2003
Domo, Roterdamo	138305	138305
Renovigo	0	5002
Teren Aspremont	1	1
Nemoveblaĵoj	138306	143308
Ekipaĵoj & mebloj	4727	4301
Komputilaj aparatoj	13124	11037
Programaro	6728	5195
Maŝinaro ktp	24579	20533
Blokitaĵoj	4766	7622
Akcoj	238288	250465

Obligacioj	2020181	1906774
Miksaj	499364	509287
Valorpaperoj entute	2757833	2666526
Stokoj libroservaj	147168	163530
Stokoj, Eldona Fako	153791	137709
Stokrezervo	-9380	-18401
Presaj, materialoj k.s.	5165	5858
Provizoj entute	296744	288696
Ricevotaj rimedoj	83253	111114
Antaŭpagitaj kostoj	-94	-147
Debitoroj	142487	173326
Debitoroj ktp entute	225646	284293
Ŝporkontoj kaj deponoj	542907	391529
Kurantaj bankokontoj	324378	378982
Kasoj diversaj	1416	1905
Kasoj/bankokontoj entute	868701	772416
Sumo de la aktivoj	4316575	4183454

PASIVOJ

Ĝenerala Kapitalo	1004298	959676
Saldo de spezokonto	-57194	-49453
Kapitalo Azio	372394	373554
Kapitalo Afriko	24546	51401
Kapitalo Eŭropo	9238	9388
Kapitalo Edukado	0	500
Kapitalo Informado/Harry	0	15008
Entute	1353282	1360074
Kapitalo Dumvivaj Membroj	602407	598587
Rezervo, debitoraro	5475	5807
Kongresa Rezervo	77295	74551
Rezervo IJK	5358	6544
Rezervo, emeritaj ofiĉistoj	107881	109049
Rezervo - 20%-a regulo	1711	34711
Rezervoj premiaj	31255	18581
Rezervoj dumvivaj (dmj/dpt)	0	26504
Aliaj sumoj rezervitaj	77847	52363
Rezervoj entute	306822	328110
Apogo Thorsen	8167	7942
Belarta Fondado	75695	76277
Fondadoj Ameriko	24050	22325

Fondaĵo Biblioteko	10862	10819
Fondaĵo Canuto	539	-187
Fondaĵo Grabowski	36184	30187
Fondaĵo Junularo	23491	29824
Konto Afriko	0	3147
Konto Azio	21099	29268
Konto Edukado/Wŭster	1153	1188
Konto Espero	18283	17868
Konto Eŭropo	9152	616
Konto Hans	0	2605
Konto Reklamado EU	117939	24710
Propaganda Konto	29906	9056
Triamonda Kongresa Fondaĵo	27983	27030
Volontula Fondaĵo	34481	34178
Fondaĵoj entute	438984	326853
Antaŭricevitaj rimedoj	60133	19311
Pagotaj kostoj	16887	50477
Pendantaj spezoj	5829	5786
Kreditoroj	1016781	1021656
Deponoj de membroj	515450	472600
Kreditoroj k.s. entute	1615080	1569830
Sumo de la pasivoj	4316575	4183454



La printempa Malferma Tago de 2003 havis relative malmulte da vizitantoj, malpli ol 80, sed la aŭtuna estis tre sukcesa (pli ol 120). Librovendado variis: dum la jaro vendoj estis sub atendoj, sed dum la Universala Kongreso en Goteborgo ili superis atendojn. Plej popularaj estis la nove aperinta *Konciza etimologia vortaro* de André Cherpillod, kaj la libro de Boris Kolker *Vojaĝo en Esperanto-Lando*. Alia nova iniciato, kompaktaĵa diskoj el la sonarkivo de Biblioteko Hector Hodler, kunmetitaj de Marcus Sikosek, trovis multajn ŝatantojn (la unua temis pri la Universala Kongreso de Rejkjaviko (1977), la dua pri recitaĵoj el nia literaturo. Dum la jaro aperis ĉe UEA kromaj eldonaĵoj: la traduko far Humphrey Tonkin de la dramo de Sekspiro *Henriko Kvina*, kaj du Esperanto-dokumentoj, de Lee Chong Yeong, *Esperanto kaj internaciaj organizoj*, kaj Detlev Blanke, *Interlingvistiko kaj esperantologio: vojoj al la faka literaturo*. Anglalingvaj dokumentoj estas preparitaj, sed atendas eldonon aliloke.

Post plurlara falo la nombro de individuaj membroj stabiligis en 2003 kaj nombris 5714 (5713 en 2002) en 111 landoj. Estis 375 (410) Membroj (M) kun Gvidlibro, 1197 (1099) M kun Jarlibro, 231 (235) junaj MJ, 2799 (2834) M-Abonantoj, 139 (161) junaj MA, 843 (860) Dumvivaj M, 23 (18) junaj DM, 26 (19) DM kun Jarlibro, 6 (5) junaj DMJ, 65 (61) Honoraj M kaj 10 (11) Honoraj Patronoj.

Gojja estas la plimultiĝo de aligitaj membroj. En 2003 la aligitaj landaj asocioj pagis por 11264 aligitaj membroj (10549 en 2002), el kiuj aligitaj membroj de TEJO estis 1908 (1162). La tuta membraro de UEA, t.e. individuaj kaj aligitaj kun, plimultiĝis de 16262 en 2002 al 16978 en 2003, t.e. kresko de 716 membroj (4,4%).

S-ro Ranieri Clerici el Italio fariĝis Dumviva Patrono de UEA, kreskigante la nombron en tiu mecenata kategorio al 3. La subtena kategorio Societo Zamenhof havis 138 membrojn (155 en 2002). Estis 71 (82) Patronoj de TEJO kaj 18 (17) Dumvivaj Patronoj de TEJO. La revuo Esperanto havis 140 (164) individuajn kaj 30 (40) kolektivajn abonantojn. Kontakto havis 262 (279) individuajn kaj 78 (221) kolektivajn abonantojn.

En la dua duono de 2003 rekomenciĝis aktivaj laboroj laŭ ankoraŭ unu aspekto de informado: oficejaj informistoj. Kadre de tiu programo estas preparataj novaj administraj sistemoj por la CO, bazitaj sur la modernaj teknologioj kaj postuloj. Ĝis la fino de la jaro estis konstruita la laborversio de la nova membro-administra programo, kaj la bazoj de la novaj administraj programoj por la Libroservo kaj la Kongresa fako, kaj preparita la prototipo de la nova reta Katalogo (<http://katalogo.uea.org>).

En 2003 la estraro komisiis eksterajn konsilistojn raporti pri la kvalito de la konstruaĵo Nieuwe Binnenweg 176. El la raportoj la estraro konkludis ke indas ripari kaj renovigi la Centran Oficejon. Tial la estraro kaj komitato decidis finance investi en la konstruaĵo. Okazis la unuaj

paŝoj estas faritaj por prezenti planon, kiel atingi tiun celon. Sed ĝi ne estos la fina celo rilate al nia historia havaĵo. UEA ne nur posedas, gardas kaj konservas la historion de la Esperanto-movado: ĝi ankaŭ esploru kiel utiligi tiun materialon el nia kultura heredaĵo en-kaj ekstermovade.

Rilate al la suprenomitaĵoj (daŭrigo de la Centra Oficejo en Rotterdam, renovigo de la posedado Nieuwe Binnenweg kaj ebligado al larĝa publiko konatiĝi kun BHH kaj aliaj kulturaj heredaĵoj) la estraro komencis informan kampanjon kiu kondukos al financa varbkampanjo. Cetere la konstato, ke malpliigas enspezoj per donacoj por diversaj agadkampoj, rezultigis starigon de celdestinitaj kapitaloj. La rentumoj estu la bazaj kaj konstantaj enspezoj por garanti la laboron sur tiuj diversaj kampoj (laŭ la ekzemplo de la Kapitalo Azio starigis i.a. Kapitalo Afriko, Kapitalo Ameriko, Kapitalo Eŭropo, same por Junularo kaj Informado ktp.).

La Estraro, surbaze de regularo aprobita de la komitato en Fortalezo, aljuĝis subvenciojn por projektoj pri informado kaj instruado.

Konkludo

Kvankam oni ne povas esti kontenta pri la progreso de la Asocio, nek de Esperanto entute, dum la jaro 2003 (trokorento ja estas malamiko de progreso...), tamen la jaro montris siajn gajnojn. Sur plej vasta kampo, nia prezidanto plurfloje atentigis, tute prave, ke, eĉ se la tradicia movado ne registras signifajn gajnojn en siaj tradiciaj laboroj, la nombro de homoj, kiuj aliĝas al la movado kiel liberaj agantoj, ekzemple pere de la reto, ŝajne kreskas; la nombro de veraj kompetentaj uzantoj de la lingvo same altiĝas dank' al la elektronikaj modeloj kaj komunikrimedoj je ilia dispono; la movado ŝajnas plijuniĝi. La granda defio de la estonteco estos ne nur stimuli la sendependan agadon de tiuj homoj kiel kontribuantoj al la Esperanto-kulturo kaj la Esperanto-socio, sed trovi la ĝustajn kadrojn por kunlaboriĝi ilin en la kunteksto ne nur de nia socio sed ankaŭ de nia Esperanto-movado.

Se temas pri UEA mem, ni vidis ĝis la fino de la jaro daŭran kaj signifan progreson en la retrankviliĝo de la homaj rilatoj en kaj ekster la Centra Oficejo de UEA – sed la problemoj de administrado ne malaperis, eĉ sur kelkaj kampoj akutiĝis. Ni rajtas esperi, ke en la jaro 2004 ankaŭ tiuj problemoj komencos reduktiĝi. En Goteborgo la komitato de UEA faris plurlajn tre gravajn decidojn pri la estonteco de nia oficejo – ĉefe, ke ĝi restu en Roterdamo kaj ke ni renovigu nian tiean oficejan domon. Tio estis neta progreso, kaj fermis longan periodon de debatado kaj hezito. Aliflanke, la grandaj laboroj ankoraŭ ne komenciĝis, kaj tio venos nur en 2004.

Dume, la informa laboro, ekzemple en Bruselo kaj aliloke, alportis signifajn fruktojn en 2003 – sed la estonteco estas iom mallkara pro severaj financaj premoj. Bone sukcesis nia kongreso – sed ĝi ne alportis la financon pluson bezonatan por vere efika laboro en 2004. La progresoj sur la kampo de instruado de Esperanto estis konsiderindaj, precipe se temas pri retaj kursoj k.s. – sed multo restas por fari. Jaro, do, de miksaĵo rezultoj, sed nepre pli pozitivaj kaj promesplenaj, ol negativaj.

Kaj la jaro 2004 estos elektoĵaro, kiam la nuna estraro adiaŭos kaj nova estraro elektiĝos. La nuna estraro dankas al la komitato kaj membraro de UEA pro la okazaj laboroj por Esperanto kaj la bono de nia asocio kaj ĝi deziras al sia posteulo kurago, diligenton, energion – kaj bonan sukceson.

LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adreso en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% pro la aldonaĵo imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimume 2,25 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe <http://www.uea.org/katalogo/>.

Aliaj tempoj. Edith Wharton. El la angla trad. E. Grobe. Tempe: Arizona stelo, 1999. 23p. 22cm. Unu el la plej belaj noveloj de gajnto de Pulitzer-Premio. € 3,30

Ĉi-semajne eĉ ajn-mise. Stefan MacGill. Thaumiers: La Kancer-kliniko, 1989. 24p. ISSN 0398 5822. 30cm. Ilus. Suplemento al *La Kancerkliniko*. Skeĉoj kaj aliaj amuzajoj. € 4,50

Ĉu nur-angla Eŭropo? Defio al lingva politiko. Robert Phillipson. El la angla trad. I. Ertl. Rotterdam: UEA, 2004. 254p. ISBN 97 3832 919 1. 22cm. Profunda kaj serioza rigardo al la nuna stato de la eŭropa lingva situacio, kun sobra analizo de ĝiaj kaŭzoj kaj efikoj. € 21,00

En la reĝno de la viva naturo. Petro Dánov. Serres: Vivo por la tuto, 1998 (reeldono). 90p. 14cm. Kolekto de eseetoj pri diversaj temoj. € 2,40

Esperanto dictionar pentru incepatori. Ionel Onet. Cluj-Napoca: Arpeggione, 2004. 168p. ISBN 973 832919 1. 21cm. Du-direkta vortaro por rumanlingvanoj kun po ĉ. 5600 kapvortoj en ĉiu direkto. € 4,80

Esperanto pre každého. Učebnica najľahšieho jazyka. Magda Saturová, František Šatura. Partizánske: Espero, 2004. 224p. ISBN 80 969042 3 X. 21cm. Dudeklekciono slovaka Esperanto-kurso "por ĉiuj", kun manpleno da legaĵoj kaj du-direkta vortaretoj. € 10,50

Heraldiko – kio ĝi estas? Nikolaj Starodubcev. Doneck: Amika rondo, 2003. 11p. 21cm. Ilus. € 1,50

Horizonte del esperanto. Esperanto, lengua para la paz. Giordano Moya Escayola. Barcelona: E-Centro, 2004. 109p. ISBN 84 933700 0 2. 30cm. Katalunlingva versio de *Esperanto en prospektivo*. € 15,00

In memoriam Adolf Burkhardt (1929-2004). Regina Lorösch, Reinhardt Hauptenthal. Malaŭcne: Iltis, 2004. 40p. ISBN 3 932807 43 X. 21cm. Ilus. Parte germanlingva. Kvazaŭ aldono al *Esperante kaj ekumene*. € 4,50

Kiel karmo efikas. Rudolph Steiner. El la germana trad. Willy Nüesch. Berno: la tradukinto, 2004. 77p. 21cm. Prezento el antropozofia vidpunkto. € 3,90

Kiel mi trovis la Kriston? Rudolph Steiner. El la germana trad. Willy Nüesch. Berno: la tradukinto, 2004. 30p. 21cm. Verkita la 16-an de oktobro 1918. € 3,90

Lengviausios kalbos vadovėlis esperanto. Saulius Keras. Vilnius: Trys žvaigždutės, 2004. 203p. ISBN 9955 454 74 1. 25cm. Ilustrita lernolibro por litovlingvanoj; 30 lecionoj. € 6,00

Leteroj de Paŭlo kaj lia Skolo. El la helena trad. G. Berveling. Chapeco: Fonto, 2004. 253p. 22cm. Serio Oriento-Okcidento, n-ro 39. La unua volumo de *La Nova Testamento*

en nova Esperanta traduko. € 19,80

Lidja Zamenhof. 29.1.1904-2004. Karmenu Mallia. Valletta: Malta E-Societo, 2004. 27p. ISBN 99932 669 0 6. 21cm. Ilus. Malta-lingva. Memolibro pri la filino de L.L. Zamenhof, publikigita okaze de la centjariĝo de ŝia naskiĝo. € 3,00

Longa daŭro. La. Edith Wharton. El la angla trad. E. Grobe. Tempe: Arizona stelo, 1999. 24p. 22cm. La decido de viro ne forfuĝi kun edziniĝinta virino ne restas sen konsekvencoj. € 3,30

Malpli da teksto kaj pli da sekso. Arnau Torras i Tutusaus. Sabadell: la aŭtoro, 2004. 56p. ISBN 84 609 0204 8. 30cm. La titolo diras ĉion pri ĉi tiu nova bildstrio. € 11,10

Mistero de Marnjo Roĝeto. La. Edgar Allan Poe. El la angla trad. E. Grobe. Tempe: Arizona Stelo, 2004. 40p. 22cm. En du libretoj. Mistera murdo de pariza junulino solvita de komisaro M. Dupin. € 5,70

Mokomés kalbėti esperantiškai. Telesforas Lukoševičius. Vilnius: Eldona Instituto pri Sciencaj kaj Enciklopediaj Libro, 2004. 103p. ISBN 5 420 01534 X. 22cm. Bind. Lernolibro por litovlingvanoj en 34 lecionoj. € 6,00

Nikolao Kopernik torunano. Cecylia Iwaniszewska. Toruń: Flamo, 1994.

ISBN 5 420 01534 X. 22cm. Bind. Lernolibro por litovlingvanoj en 34 lecionoj. € 6,00

Rotiko kaj politiko; amuzo kaj (m)am-uzo. € 12,30

€ 20cm. Eta biografio. € 0,90

Provizore. István Ertl. Rotterdam: Bero, 2004. 59p. 17cm. Originala poemaro de talenta aŭtoro kaj tradukisto. € 6,00

Reenkarniĝoj kaj karmo. Rudolph Steiner. El la germana trad. Willy Nüesch. Berno: la tradukinto, 2004. 26p. 21cm. Imagoj necesaj el la starpunkto de la moderna naturscienco. € 3,90

Reĝino Jokasta. Triakta dramo. Constantin Zărnescu. El la rumana trad. I. Onet. Chapeco: Fonto, 2004. 200p. 22cm. La mito pri Edipo, vidata per la okuloj de 20-jarcenta verkisto. € 16,50

Reveno al la manĝoj de ĉiela patro. Saniga menuo. Kristina-Maria Luite. El la estona trad. Kalju Pii. 1995. 44p. 21cm. Ilus. Krud-vegetalaj menuoj, instruoj pri akvaj kaj vaporaj proceduroj por kuraco de diversaj malsanoj. € 4,50

Robinsono Kruso. Liaj vivo kaj strangaj mirindegaj aventuroj. Daniel Defoe. El la angla trad. A. Krafft. Novjorko: Mondial, 2004. 125p. ISBN 1 59569 001 8. 20cm. Lingvaj korektoj: U. Becker. Reeldono, iom korektita, de la unua Esperanta eldono (1908), kun kelkaj originalaj ilustraĵoj de Walter Paget. € 16,50

Ŝanco per la tempotrakto. Margarete Bettmann. Gütersloh: Turmalin, 2000. 28p. 21cm. Priskribo de novtipa vojo al facila, sukcesa, harmonia vivo. € 3,00

Vivo simplas. La. Arnau Torras i Tutusaus. Sabadell: la aŭtoro, 2004. 56p. ISBN 84 609 0203 X. 30cm. Erotiko kaj politiko; amuzo kaj (m)am-uzo. € 12,30

foto: Ziko M. Sikosek



KOMPAKTDISKOJ

Faŭsto. Johann Wolfgang von Goethe. El la germana trad. Karl Schulze. Novjorko: Mondial, 2004. La kompleta versio en la originala germana kaj en Esperanto, en formato PDF. Sur la sama disko ankaŭ Adobe Reader por Vindozo. € 15,00

Internationale Plansprachen. Ein Einführung. Detlev Blanke. Berlin: la aŭtoro, 2004. Germanlingva. Elektronika versio de la samtitola libro, kun aldona materialo. € 12,90

Paco. Organo de la MEM-sekcio de Germana Demokratia Respubliko. Berlin: Arbeitsgruppe zur Erforschung der Geschichte des E-Verbandes im Kulturbund der DDR, 2004. Ĉiuj GDR-eldonoj de *Paco* (1966-1989), en PDF-formato. € 6,60

Walerian (Waldi) Baumgart (1911-2004) mortis la 18-an de aprilo 2004 en Bydgoszcz (Pollando).

Roger Colney (1917-2004) el Gap Cedex (Francio) mortis la 3-an de aprilo 2004.

Georges Lagrange (1928-2004), Akademiano, membro de Franca E-Instituto, mortis la 30-an de aprilo 2004 en Bourses (Francio). Esperantisto ekde 1947, la kunfondinto de la E-Centro "Kvinpetalo" verkis interalie *Sia lasta poŝtkarto* (1988), kaj tradukis interalie kanzonojn de Brassens.

Héctor Palacios (-2004), D kaj FD (pentrado), mortis en Villa General Belgrano (Argentino).

Károly Fajsz forpasis la 3-an de februaro (1911-2004). Li estis



emerita poŝtfcicisto, honora membro de UEA, honora membro de Hungaria Esperanto-Asocio, kunfondinto de nia faka asocio pri



poŝto kaj telekomunikado (IPTEA) en Hungario. Lia lando honorigis lin interalie per la Malgranda Kruco de la Ordeno de Hungara

Respubliko (1994), kaj lia naskiĝ-urbo faris lin honora civitano. Li esperantistiĝis en 1964 kaj komencis kolekti Esperantajn librojn kaj aliajn esperantajn. La kolektaĵo riĉiĝadis ĉefe pere de interŝanĝoj, por kio li oferis sian familian heredaĵon. La finrezulto de la preskaŭ kvarjardeka kolektado estis, en 2002, 17mil volumoj, okmil binditaj jarkolektoj de periodaĵoj, dekmil periodaĵoj ne kompletaj, kaj multo pli. Ekde 1982 la kolekto estas ŝtate protektata, sub aŭspicio de la Nacia Széchenyi-Biblioteko. En 1991 aperis lia 550-paĝa *Katalogo de la Esperanto-Kolektaĵo*. En 2002 li transdonis la kolekton al la Landa Fremdlingva Biblioteko por ŝtata administrado.

(Laŭ Ada Csiszár)

Kiel funkcias UEA?

Universala Esperanto-Asocio havas sian Centran Oficejon (CO) en Roterdamo, Nederlando. La profesia stabo de la Asocio laboras en domo en unu el la grandaj stratoj de la urbo. Tie troviĝas i.a. la Biblioteko Hodler, la Libroservo kaj la kongresa administrejo.

La konstruaĵo estas posedaĵo de UEA, kiun ĝi aĉetis en 1961. La brika domo estis konstruita en 1887. Gvidanto de la administracio de UEA estas la Ĝenerala Direktoro. La Komitato estas la ĉefa gvida organo de la Asocio: ĝi konsistas el reprezentantoj de la landaj kaj fakaj asocioj aliĝintaj al UEA (komitatanoj A), reprezentantoj de la membraro (komitatanoj B), kaj alelektitaj komitatanoj (komitatanoj C). Ĝi kunvenas ĉiujare en la Universala Kongreso de Esperanto. Ĉiun trian jaron ĝi elektas Estraron, kutime 7- aŭ 8-membran, por teni superrigardon de la Asocio kaj fari necesajn decidojn inter la komitatkunsidoj. Helpas la estraron diversaj komisionoj kaj komisiitoj pri specifaj taskoj.

La ĉiujara Universala Kongreso de Esperanto estas organizata de UEA en kunlaboro kun Loka Kongresa Komitato, ĉiam en alia lando. Okazis ĝis nun 88 kongresoj: tiu por 2004 okazos en Pekino, Ĉinio. Por siaj membroj UEA eldonas ĉiunmonate revuon kaj ĉiujare Jarlibron kaj funkciiĝas ampleksan retpaĝaron.

Rento je fiksdaj deponoj 3%

Pro la evoluo en la monmerkato UEA malaltigas la renton je la ŝpardeponoj de la membroj el 3,5% al 3% ekde la 1-a de julio 2004.

Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro

La Estraro de UEA



Renato Corsetti, prezidanto (strategia forumo, strategio kaj planado, Unesko), lama prezidanto de TEJO. Profesoro pri Psikopedagogio de Lingvo kaj de Komunikado en la fakultato Psikologio 1 de la Universitato La Sapienza, Romo. **Humphrey Tonkin**, vicprezidanto (kulturo, esploro kaj dokumentado), lama prezidanto de TEJO; prezidanto de UEA 1974-80 kaj 1986-89. Universitata profesoro pri Humanistiko ĉe la Universitato de Hartford, Usono; iama prezidanto de la universitato. **Lee Chong-Yeong**, vicprezidanto (eksteraj rilatoj). Iama prezidanto de Korea Esperanto-Asocio; prezidanto de UEA 1995-98. Iama profesoro pri ekonomiko de ŝtata Universitato Kyongpook, Koreio, kaj nuna prezidanto de Korea Instituto por Industria kaj Ekonomia Disvolviĝo. **ivo Osibov**, ĝenerala sekretario (faka agado, rilatoj kun la komitato, kongresoj). Iama prezidanto de TEJO. Iama estro de jura sekcio de granda industria entrepreno. Supera lekcisto pri komerca juro kaj kompania juro en la Jura Fakultato de Split, Kroatio. **Ans Bakker-ten Hagen** (financo, administrado). Unua prezidanto de la landa asocio Esperanto-Nederland. Iama estrarano de diversaj organizaĵoj pri emancipado (sindikato, edukado); emeritiĝinta skabeno. **Gbego Koffi** (edukado, sporto, afrika agado). Aktivulo de la Togolanda Esperanto-

movado, redaktoro de ĝia bulteno. Verkisto de rakontoj kaj de lerniloj en Esperanto. Instruisto pri matematiko. **Andrej Grigorjevskij** (informado, rilatoj kun TEJO). Dufoja prezidanto de Rusia Esperanto-Unio. Esperanto-instruisto kaj organizinto de ĉ. 40 Esperanto-renkontiĝoj. Profesia retejfaristo. **Michela Lipari** (landa kaj regiona agado), lama komitatano de TEJO, estrarano de UEA de 1992, estrarano de Itala Esperanto-Federacio. Funkciulo de la itala ŝtata kontrolkortumo.

Institucio Hodler '68: la ŝtalsranko de la movado

Se vi volas subteni la movadon finance, bonvolu peti informojn pri nia agado:

IH '68, Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, tel. +31 10 436 1044, fakso +31 10 436 1751 rete: uea@co.uea.org



POR LERNI KAJ ARGUMENTI

Ĉu la lingvopolitiko de internaciaj organizaĵoj utilas nur por simbola politikaj celoj? Ĉu aktualaĵ modeloj de plurlingva demokratio efektive diskriminacias? Kian rolon ludu lokaj lingvoj en la solvado de mondaj problemoj? Kian rolon lerni el la spertoj pri Esperanto? Ĉu kontribuoj en la originala lingvo (angla, franca aŭ Esperanto), aŭ rezuma en ĉiuj tri lingvoj. La angla teksto de la pionira raporto "Esperanto kaj la lingva demando de Ligo de Nacioj" de Nitroer mazi estas unusofle publiĝita ti-livro.

Al lingva demokratio / Towards linguistic democracy / Vers la démocratie linguistique. Aktoj de la Niobe-Simpozio, Prago, 1996. Red. M. Fettes kaj S. Bolduc. Rotterdam: UEA, 1998. 212p. 24cm. € 10,20. Triona rabato ekde tri ekz.

ĈU VI VOLAS DEFENDI ESPERANTON TRAFE?

Lernu el tiu ĉi DISKUTLIBRO POR MALPLI UZATAJ LINGVOJ unue eldonita de la Eŭropa Buroo por Malpli Uzataj Lingvoj.



Diskutlibro pri malpli uzataj lingvoj. Jordi Bañeres kaj Miquel Strubell. Trad. Edmond Grimley Evans. Rotterdam: UEA, 2002. 59p. 22cm. Prezo: €7,50. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

KIO ESTU NIA LINGVOPOLITIKO?

Ĉu ni bezonas lingvopolitikon? Kio estas lingvopolitiko? Ĉu nur UEA devus havi ĝin aŭ la tuta Esperanto-Komunumo? Kiel lerni el la spertoj de naciaj lingvoj? Kontribuoj de Humphrey Tonkin, Werner Bornmann, YAMASAKI Seiko, Amri Wandel, Renato Corsetti kaj Detlev Blanke.

Por aktiva lingvopolitiko. Aktoj de la lingvopolitika seminario en la B1-a UK de Esperanto, Prago 1996. Red. D. Blanke, R. McCoy kaj O. Buller. Rotterdam: UEA 1999. 71p. €7,10. Triona rabato ekde tri ekz.

ĈU LINGVA IMPERIISMO?

Profunda kaj serioza rigardo al la nuna stato de la eŭropa lingva situacio, kun sobra analizo de ĝiaj kaŭzoj kaj efikoj.



Ĉu nur-angla Eŭropo? Defio al lingva politiko. Robert Phillipson. Trad. István Ertl. Rotterdam: UEA, 2004. 254p. 22cm. Prezo: €21,00. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

niaj furoraĵoj

saluton! esperanto aŭtodidakte



Audrey Childs-Mee
(1926-1990).
Rotterdam:
UEA, 2002.
Sepa eldono.
234p. 21cm.
ISBN 92 9017 050 6.
Prezo: € 10,80.

VOJAĜO EN ESPERANTO-LANDO



Boris Kolker (1939).
Rotterdam:
UEA, 2002.
Dua, reviziita kaj
korektita eldono.
279p. 21cm.
ISBN 92 9017 078 6.
Prezo: € 18,00.

VIA UNUA VORTARO



BAZA
ESPERANTA
RADIKARO.
Wouter F. Pilger (1942).
Rotterdam: UEA, 2001.
160p. ISBN 92 9017 076 X.
18cm. Prezo: € 7,50.

Bonega unua vortaro por studanto de Esperanto, kvazaŭ miniatura Plena Ilustrita Vortaro, per kies uzado oni ne nur lernas vortojn sed ankaŭ ekpersas en Esperanto. Pli ol 2700 radikoj klarigitaj per oftaj kaj kutimaj vortoj, kaj kun indiko pri iliaj ofteco kaj utileco.

POR FACILE TROVI ALIAN VORTON

ESPERANTAJ SINONIMOJ.
Jaan Ojalo (1914).
Rotterdam: UEA, 1999
(3-a, korektita eld.).
96p. Prezo: € 7,20.



Ofte oni sentas la bezonon vigligi kaj variigi sian stilon per uzo de sinonimoj aŭ de preskaŭ-sinonimoj. Por helpi en tio, la estona aŭtoro kompilis tiun ĉi vortaron. Bazita sur PIV, ĝi enhavas 1925 kapvortojn kaj 5500-vortan indekson. Taŭga fonto por ĉiu kiu volas pliriĉigi sian vortostokon.

triona rabato por mendo de minimume tri ekzempleroj de la sama libro senditaj samtempe al la sama adreso